

# ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



*Profesoro W. E. Collinson estas unu el la prelegantoj en la Internacia Somera Universitato, Mainz, 1958.*

**N-ro 626 (1)**

**Januaro 1958**

**Universala  
Esperanto-Asocio**

**(En Konsultaj Rilatoj kun  
U.N.E.S.C.O.)**



Fondinto: H. HODLER

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro:  
MAG. W. AULD, Knockfarril, Thornside Road, Johnstone,  
Renfrewshire, Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto  
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA  
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7. Rotterdam-C.,  
Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la  
redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la  
1-a de la antaŭa monato

#### Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke  
oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1958): 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro  
12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

#### Tarifo por reklamoj:

1 paĝo 128,— gld  $\frac{1}{2}$  paĝo 64,— gld  $\frac{1}{4}$  paĝo 32,— gld  
 $\frac{1}{8}$  paĝo 16,— gld  $\frac{1}{16}$  paĝo 8,— gld

#### Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkuponon por ĉiu  
duo da vortoj. Legantoj en 80 landoj.

#### Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof D-ro Ivo Laçenna, ĝenerala sekretario 77, Grasmere Avenue  
Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes. O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road,  
London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban,  
Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale  
Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj,  
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

#### Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.  
Telefono: ARNold 90-81.

## Enhavo

La preparlaboroj por la Zamenhofa Datreveno	1
Alvoko . . . . .	3
Vekiĝo. <i>E. de Kock</i> . . . . .	4
Sonateto. <i>Dario</i> . . . . .	5
Fiat Nox. <i>Leconte de Lisle</i> . . . . .	5
Esperantujo en bildo kaj sono . . . . .	6
La grupoj, kerno de nia movado . . . . .	7
Venuso kaj Vulkano, <i>Boulton</i> . . . . .	7
Intervjuo kun H. F. Scott . . . . .	8
Belarta Konkurso 1958 . . . . .	15

#### Rubrikoj

CED . . . . .	2
Esperantista vivo & Nekrologo . . . . .	3
43a U.K. . . . .	6
Novaj libroj . . . . .	9
La Juna Vivo . . . . .	12
Nia Forumo . . . . .	15
Tra la mondo . . . . .	14
La internaciaj konkursoj . . . . .	14
Oficiala informilo . . . . .	15

**OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)



# LA PREPARLABOROJ POR LA FESTOJ OKAZE DE LA 100-JARA DATREVENO DE LA NASKIĜO DE ZAMENHOF

En la lasta kunsido de la Komitato de UEA en Marseille estis, interalie, pritraktita la propono farita de s-ro I. Dratwer en la nomo de la polaj komitatanoj pri la festado de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof en 1959. La Komitato principe akceptis la proponon kaj transdonis al la Estraro la taskon ellabori la planon. Pro la graveco de la evento la Estraro devis diskuti multajn detalojn. Fine ĝi akceptis ĝeneralan provizoran planon de la festoj kaj decidis komuniki ĝin al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj al la tuta esperantistaro.

1) *La celo.* La Estraro konscias, ke ne malatentante la daŭran realigadon de la Baza Laborprogramo de UEA, estas necese utiligi tiun unikan okazon ne nur por digne festi la memoron de D-ro Zamenhof, sed ankaŭ por speciale vasta informado pri la Internacia Lingvo, por penetrado en pliajn kulturajn mediojn, firmigo de la pozicioj en diversaj interŝtataj organizaĵoj kaj kulturaj movadoj. Fakte, la Estraro imagas la festadon de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof kiel imponan mondan manifestacion de la Esperantismo, kiu devas tiel fortikigi la poziciojn de Esperanto, en la publika opinio kaj en la decidaj kulturaj-edukaj medioj, ke tuj post tio oni povos entrepreni novan kampanjon por la enkonduko de la lingvo en la lernejojn.

2) *Planataj aranĝoj.* La unua plano de la festoj antaŭvidas jenajn aranĝojn: a) disvastigo de la verko de Prof. Privat pri la vivo de Zamenhof kaj traduko de tiu verko en kiel eble plej multe da naciaj lingvoj; b) CED eldonos dum la tuta jaro 1959 specialajn dokumentojn pri Zamenhof kaj Esperanto; c) CED eldonos tute apartan dokumenton pri la vivo kaj verko de Zamenhof kaj prizorgos ke tiu dokumento estu publikigita en kiel eble plej multe da naciaj lingvoj; d) CED liveros rekte al la mondaj presagentejoj kaj al siaj kunlaborantoj (por traduko en naciajn lingvojn) artikolojn pri Zamenhof, verkitajn de la plej elstaraj esperantistoj de diversaj landoj; e) la Informa Fako liveros dum la tuta 1959 abundajn informojn pri Zamenhof kaj la lastjaraj progresoj de Esperanto al la landaj informaj fakoj kaj al la mondaj presagentejoj; f) speciala kampanjo en radio; g) specialaj festoj dum la Jubilea Universala Kongreso de Esperanto en 1959; h) la Internaciaj Esperantorevuoj dediĉos laŭ la ebleco la tutan decembran numeron 1959 al la aŭtoro de Esperanto; i) la naciaj organoj de la landaj asocioj publikigu specialan numeron nacilingve pri la vivo kaj verko de Zamenhof en kiel eble plej multe da ekzempleroj kaj vaste distribuu ĝin; j) la landaj kon-

greso en 1959 havu solenajn kunsidojn (kun mal-longaj prelegoj, muzikaj punktoj, deklamadoj k.s.) dediĉitajn al Zamenhof; k) ĉiuj lokaj grupoj en la mondo organizu la tagon mem de la naskiĝo de Zamenhof altnivelajn publikajn aranĝojn en la plej belaj salonoj kaj invitu la ĵurnalistojn, la reprezentantojn de la lokaj, provincaj aŭ ŝtataj kulturaj institucioj kaj edukaj instancoj (detaloj pri tiuj festoj ricevotaj de la Kultura Komisiono de UEA); l) ĉiuj publikaj aranĝoj estu utiligataj por plia informado pere de la gazetaro, radio kaj aliaj rimedoj laŭ la landaj kaj lokaj cirkonstancoj; m) laŭ ebleco eldonu en 1959 de kompleta Bibliografio, kies manuskripto ĝis tiam tute certe estos preta; n) laŭ ebleco filmu pri la vivo de Zamenhof.

Tio estas nur ĝenerala skizo de la plano, adaptenda al la cirkonstancoj dum la laboro mem. Kompreneble, oni povos ĝin kompletigi per pliaj realigeblaj sugestoj.

3) *Organizo.* La grandeco de la plano postulas bonan organizon kaj konsiderindajn financajn rimedojn. Rilate la organizon la Estraro opinias, ke devos esti tuj formita *Internacia Organiza Komitato por la Festoj de la Zamenhof-Jaro* (mal-longe: IOK por la Zamenhof-Jaro), kiu, sub la prezido de la Prezidanto resp. Vicprezidanto de UEA konsistu el: la Patrono de UEA, la Honoraj Prezidantoj de UEA, ĉiuj Estraranoj, la reprezentantoj de SAT, po unu reprezentanto de ĉiu aliĝinta landa asocio, po unu reprezentanto de la esperantistoj el landoj sen landa asocio (ĉefdelegitoj aŭ perantoj, se tiaj ekzistas), la Prezidanto de la Akademio, po unu reprezentanto de ĉiu faka aŭ specialigita internacia Esperanto-organizaĵo. Se necese tiu komitato povos esti kompletigita. Ĝi devas esti kiel eble plej internacia kaj ĝia tasko estos aprobi la definitivan programon pri la festoj dum aparta kunsido de la kongreso en Mainz. Ĝia tasko estos ankaŭ prizorgi la *Internacian Patronan Komitaton* en kiun, laŭ la plano, devus eniri tre elstaraj personoj de diversaj landoj; ĉefministroj aŭ ministroj, konataj verkistoj kaj artistoj, konataj sciencistoj kun plej altaj kvalifikoj kaj simile. La Patrona Komitato havos la celon doni apogon kaj prestiĝon al la tuta afero per la nomoj kaj pozicioj de siaj membroj. De la sukcesa konsisto de la Patrona Komitato dependos multe ne nur la karaktero de diversaj aranĝoj, sed ankaŭ pluraj aliaj klopodoj, pri kiuj estas pli oportune ne paroli en la nuna momento. Kompreneble, pro la grandeco de ambaŭ komitatoj estas necese formi tute specialan, malgrandan *Laboran Komitaton* kiu konsistos, laŭ la decido de la Estraro, el la Ĝenerala Sekretario, la Direktorino de la Centra Oficejo,



la Redaktoro de la Revuo kaj la Konstanta Kongresa Sekretario. Tiu Labora Komitato agos laŭ la direktivoj de la Internacia Organiza Komitato kaj estos daŭre helpata de la Kultura Komisiono kaj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj instancoj. La amplekso de la laboro postulos, ke la rekta korespondado estu limigita ĝis plej alta grado. Ĉefe oni laboros per cirkuleroj.

4) *Financa helpo.* Estas tute klare, ke sen konsiderindaj financaj rimedoj la plano ne povos esti realigita. Fakte, de la disponeblaj rimedoj multe dependas la amplekso kaj la kvalito de la realigoj. Sekvo la Estraro decidis fondi specialan Fondadon Zamenhof kaj alvoki la tutan esperantistaron abunde kontribui por tiu celo. La Estraro deziris montri ekzemplon kaj jam kolektis la komencan sumeton de 50 anglaj pundoj.

La unua plano estas farita. La unua cirkulero jam estas sendita al ĉiuj landaj asocioj kaj al la aliaj Esperanto-organizaĵoj. La tuta esperantistaro estas nun informita pri la projekto de la festoj. Ĉiuj Esperantistaj asocioj, societoj, grupoj, fakaj kaj aliaj organizaĵoj, ĉiuj unuopaj esperantistoj unuigu ankoraŭ pli firme, por ke la Esperantismo povu plej digne omaĝi la memoron de la genia aŭtoro de la Internacia Lingvo kaj por ke tiu grava evento signifnu plian etapon en la progresado de Esperanto al la fina celo.

*Prof. D-ro Ivo Lapenna.*

# CED

Centro de Esploro  
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.  
Telefono ARNold 90-81

## Plia eldono de la dokumento CED/5 en la angla

La dokumento de CED sub la titolo „Sepdek jaroj de la Internacia Lingvo”, kiu aperis en 4 naciaj lingvoj, nun estas reeldonita en la angla kiel Doc.RDC/5. La dokumento estas publikigita en formo de broŝuro kun verda kovrilo aŭ sen kovrilo. La eldonon prizorgis je siaj kostoj la kunlaboranto de CED por teknikaj multobligoj s-ro Rüdiger Eichholz, Esperanto Press, Oakville, Ont., Kanado. La prezo de la broŝuro estas 10 ekzempleroj sen kovrilo 0,70 dol., kaj kun kovrilo 0,85. Por 25 ekzempleroj la prezo estas 1,50 dol. resp. 1,80 por tiuj kun kovrilo.

La broŝuron oni mendu rekte ĉe la eldoninto: Esperanto Press, Oakville, Ont. Kanado.

## Esperanto denove en la publikajoj de UNESKO

UNESKO ĵus eldonis la verkon de D-ro Holmstrom „Scientific and Technical Translating and Other Aspects of the Language Problem” (Scienca kaj Teknika Tradukado kaj Aliaj Aspektoj de la Lingva Problemo). En la verko estas parte utiligita la ampleksa raporto, kiun siatempe CED estis sendinta al D-ro Holmstrom. Same tiel en la verko estas presita parto de la artikolo, kiun la direktoro de CED siatempe publikigis en „Associations”, organo de la Internacia Unio de Internaciaj Asocioj (pp. 182, 183). Malgraŭ la fakto, ke CED liveris precizajn informojn rilate

Esperanton, tamen en la verko enŝteliĝis pluraj eraroj. Tial CED, laŭ la peto de D-ro Holmstrom, sendis plian kritikan raporton. En sia letero de la 12-a de novembro, skribita en Esperanto, D-ro Holmstrom dankis pro la helpo kaj diris, ke en la sekvanta eldono ĉiuj eraroj estos korektitaj.

Post la eldono de afiŝoj kun teksto en Esperanto fare de UNESKO, antaŭnelonge ankaŭ Unuiĝintaj Nacioj publikigis belan afiŝon kun mallonga teksto en Esperanto. Tiu plia sukceso estas rezulto de kunlabora agado de UEA kaj Esperanto-Ligo por Nordameriko.

Menciinde estas, ke niaj usonaj geamikoj estis akceptitaj, okaze de sia brila kongreso en New York, en la Domo de Unuiĝintaj Nacioj. Tiuokaze estis findecidite eldoni la afiŝon de U.N. rilate la Tagon de Unuiĝintaj Nacioj. Tiu ĉi plia oficiala eldono signifas paŝon antaŭen en la uzo de Esperanto fare de interŝtataj oficialaj organizaĵoj. Dankon kaj gratulon meritas ELNA.

En UNESCO-Features sendata al dekmilo da gazetoj tra la mondo, troviĝas denove informo pri kultura agado per Esperanto. Ĉi-foje, en la numero de la 11-a de novembro 1957, estis tre bona sciigo pri la kultura aranĝo en la Esperanto-Domo en Grésillon sub la titolo „Kulturoj kaj Civilizoj de la Mondo”. Sufiĉe longa artikolo pri la sama aranĝo aperos en la bulteno „International Social Science Bulletin”, eldonata de UNESKO.

## Mallongaj informoj

**Unu artikolo en 12 naciaj lingvoj.** La artikolo de Prof. I. Lapenna „Sepdek jaroj de la Internacia Lingvo”, aperis, laŭ la pliaj informoj, entute en 94 gazetoj kaj revuoj en la lingvoj: ĉeĥa, greka, finna, franca, germana, itala, japana, portugala, rumana, serba-kroata, slovena kaj sveda. La raporto de la Japana Esperanto-Instituto emfazas, ke tiu artikolo elvokis aron da aliaj, petitaj de diversaj ĵurnaloj mem. Tiel la tagĵurnalo „Asahi” (la plej kompetenta en Japanujo) petis s-ron Mijake-Sihej pri la nuna stato de la Esperanto-Movado por la literatura sekcio. La artikolo aperis en la eldono de la 13-a de julio por Tokio kaj poste en ĉiuj aliaj, entute en 4 milionoj da ekzempleroj. Alia gazeto „Yomiuri” aperigis la artikolon pri la „Sepdek jara datreveno” en sia eldono de Osaka. Tiu gazeto estas eldonata en pli ol unu miliono da ekzempleroj. Resumoj de la artikolo aŭ intervjuoj okaze de ĝi aperis en 9 japanaj gazetoj, inter la aliaj ankaŭ en la plej grava literatura revuo „Sintyo”.

**Laboro en Azio.** La kunlaboranto de CED Lic. Tibor Sekelj informis la 24-an de novembro, ke li forlasis Nepalon, kie li fondis societon kun ĉ. 25 membroj. La Esperanto-societo en Kathmandu organizis kunvenon okaze de la Tago de U.N. La kunvenon ĉeestis 80 personoj. Nun li veturos al Indonezio kaj poste daŭrigos sian grandan laboron en Aŭstralio, Filipinoj kaj Japanujo.

## DONACIOJ POR CED

	£	s	p
La stato je la 25-a de oktobro . . . . .	136	8	5
D-ro Halbedl, Aŭstrujo . . . . .	1	0	3
D-ro P. Roelofs, Nederlando . . . . .	18	9	
S-ro R. Imbert, Nederlando . . . . .	4	8	
F-ino N. Hanson, Britujo . . . . .	10	0	
S-ino Edith E. Mason, Britujo . . . . .	10	0	
Sveda Esperanto-Federacio, Svedujo . . . . .	25	0	0
Stato je la 30-a de novembro 1957 . . . . .	164	12	1

Al ĉiuj donacintoj plej koran dankon. Tute specialan dankon al Sveda Esperanto-Federacio, kiu ĉiujare, ek de la fondiĝo de C.E.D. donacas al ĝi altajn sumojn, entute pli ol 100 pundojn. Ankaŭ kelkaj aliaj landaj asocioj helpis de tempo al tempo. Sed kio pri la aliaj? Ĉu C.E.D. ne laboras por la tuta Movado?

Donacojn por C.E.D. oni povas sendi al la Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam C. Nederlando, al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue de Chabrol, Paris X, Francujo; al ĉefdelegitoj aŭ perantoj de U.E.A. aŭ al C.E.D. rekte je la nomo kaj adreso de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex.



## La familio A. P. Ganto

*Sinjoro G. perlaboras sian vivon en unu el la centmil okupoj de la hodiaŭa mondo. Li interesiĝas pri ĉio kio donas enhavon, valoron kaj koloron al la moderna vivo. Pro tio daŭre mankas al li libera tempo. Li ja ankaŭ havas familion. Jam delonge li scias pri Esperanto. Li havas gekonatojn, kiuj okupiĝas pri ĝi. Ĉar li estas progresema homo, li ne estas kontraŭ ĝi kaj ne malemus iel helpi al ĝi, kvankam li mem ne havas okazon lerni la lingvon.*

*Sinjorino G. estas bonega dommastrino, kiu estas plene okupita per la sennombraj taskoj de edzino kaj patrino. Ankaŭ ŝi scias pri Esperanto pere de tiuj gekonatoj kiuj, ŝajne, havas multan plezuron per ĝi. Ŝi eble ne tute komprenas la signifon de tiu grava interkomprenilo, sed ĝi devas esti io bona kaj ŝi ĉiam simpatias al bonaj aferoj.*

*La filino estas tre klera. Ŝi jam estas studentino. Ŝi flue parolas plurajn lingvojn kaj jam estis en eksterlando. Ŝi opiniis, ke por intelektuloj Esperanto ne havas multan sencon, sed jam ŝi spertis, ke per sia lingvoscio ŝi ne povas atingi ĉion kion ŝi volas. Do, tamen, eble Esperanto povas esti utila kaj indas subtenon... kvankam ŝi mem neniel trovos tempon lerni ĝin.*

*La filo laboras en komerca entrepreno. Krome, li faras sporton kaj okupiĝas pri junularmovado. Li ne ofte pensas pri mondaj problemoj, sed li rimarkis ke okaze de renkontiĝoj de diverslandaj junuloj aŭ sportuloj plurfoje estiĝis komplikaj situacioj. Tio igis lin pensi pri tiu hobia de la konatoj de lia patro... Eble tiu ideo ne estas tiel malsaĝa, eĉ kvankam li mem ne havas tempon por la studo.*

*La familio A. P. Ganto havas sennombrajn gekuzojn, geonklojn kaj aliajn parencojn en la tuta mondo. Sendube ankaŭ inter viaj gekonatoj. Ili estas la potencialaj APOGANTOJ DE U.E.A.*

*Transformu ilin tuj en realaj Apogantoj! M. H. Vermaas*

## ALVOKO

### por financa kontribuo al la *Fondaĵo-Zamenhof*

En alia loko de tiu ĉi numero troviĝas artikolo pri la preparaj laboroj por la festoj okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

Por povi plenumi la planon estas necesaj ne nur bona volo, multe da laboro kaj oferema sindediĉo, sed ankaŭ financaj rimedoj.

Tial la Estraro de UEA, kiu jam kolektis la komencan sumeton de 50 anglaj pundoj, turnas sin al ĉiuj Esperanto-organizajoj kaj al ĉiuj unuopuloj malavare kontribui laŭ siaj eblecoj al la Fondaĵo-Zamenhof. La pli bonstataj esperantistoj helpu laŭ sia bontrovo. Agemaj esperantistoj prezentu la aferon al la kunvenoj de la lokaj grupoj kaj faru kolektojn tie. Oni kolektu ankaŭ ekster esperantistaj medioj, se por tio prezentiĝas okazo. Ne troviĝu eĉ unu esperantisto en la mondo, kiu ne kontribuos almenaŭ malgrandan sumeton por tiu grandioza celo. Oni kolektu ankaŭ en landoj, kiuj havas valutajn malfacilaĵojn kaj ne povas sendi la kolektitajn sumojn al eksterlando.

La kontribuojn oni sendu aŭ al la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, aŭ al la ĉefdelegitoj kaj perantoj de UEA menciante ĉiam la celon: por la Fondaĵo-Zamenhof.

Ĉiuj kolektitaj sumoj estos utiligataj ekskluzive por la realigo de la plano, nome por diversaj aranĝoj okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

La nomoj de ĉiuj donacintoj aŭ grupoj estos daŭre publikigataj en la oficiala organo „*Esperanto*”. La kontrolaj organoj de UEA kontrolos ankaŭ tiun konton.

Ĉiu faru sian devon kaj helpu, ke la 100-jara datreveno estu digne festata en la tuta mondo!

## FILMA SERVO de U.E.A.

1. La Estraro de U.E.A. decidis, sub la nomo „*Filma Servo de U.E.A.*”, krei, novan konstantan aktivecon, en la kadro de la agado de la Fako por kulturaj Aferoj, kaj sub la gvidado de S-ro G. C. Fighiera.
2. La Filma Servo havas la taskon krei pli vastajn kondiĉojn por la utiligo de la filmoj parolataj en Esperanto, per organizado de planitaj projekciaj kampanjoj tra la tuta mondo.
3. Tiuj projekcioj devas okazi zorge de surlokaj Esperanto-Unuiĝoj, ĉefe por neesperantista publiko kaj kun samtempa traduko en naciajn lingvojn.
4. Ĉiu nova aperanta filmo Esperante parolata, estu anoncata al la gvidanto de la servo S-ro Fighiera, por ke li povu listigi ĝin kaj envicigi ĝin en la koncernen projekcian kampanjon.
5. Sendokostoj kaj projekciaj elspezoj estas pagendaj de la koncernen Esperantaj Unuiĝoj, kiuj utiligas la servon.
6. La adreso de la Servo estas „*Filma Servo de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando*”.

## ESPERANTISTA VIVO

### Naskiĝoj

**Koopmans.** Al ges-roj Koopmans en Hilversum la 26-an de oktobro 1957 naskiĝis kvara infano Rients Peter Espero.

**Rosbach.** Al ges-roj Dagny kaj Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg, Norveĝujo, naskiĝis la 28an de oktobro 1957 la dua filo.

### Geedziĝoj

**Melger-Eijsberg.** En Dordrecht la 13an de novembro 1957 geedziĝis niaj membroj Jan Melger kaj Antoinette Eijsberg.

## NEKROLOGO

**Bodnarsky.** Vladimir Bodnarsky, 70-jara dum novembro 1957 mortis akcidente en Nice, Francujo.

**Ĥavkin.** Natan Bencion Ĥavkin, iniciatinto de la „*Zamenhof-Fondo*” kaj de la „*Tutmonda Esperanta Vegetara Asocio*”, mortis post mallonga malsano en Jerusalemo la 17an de novembro 1957, 83-jara.

**Reni.** La 30-an de septembro 1957 mortis en Verona Kavaliro Amerigo Luigi Reni, esperantisto dum pli ol 50 jaroj kaj organizinto de la Unuiĝo de la Italaj Katolikaj Esperantistoj.



## Vekiĝo

Edwin de Kock

La pendigoto marŝas inter du gardistoj. Malantaŭe venas la deĵoranta pastro, kun kiu li jam ne volas interrili. Li transiris jam duonon de la modere longa, sed hodiaŭ tiel brutale kurta vojeto, kies ĉiu trajto estas konektita kun la fadenoj de lia menso. Dum la tagoj de lia atendado en la prizono oni permesis al li horojn por ekzerci sin sur ĉi tiu per muroj enfermita tereno. Tiam li povis rigardadi la vojeton ĝis kie ĝia kurbita grua simetrio malaperas sub pordegon kun kupraj boltoj, kiu kaŝas kaj distranĉas la preteraĵon, krom je Iuj Specialaj Tagoj, kiam oni ĝin apertas. Kiel hodiaŭ! Ankaŭ nokte li multege okupiĝis pri tiu ĉi vojeto, kaj aŭdis subkalkanume ĝian krakadon kiam li dum inkubo laŭpromenis ĝin en kurioze griza, nek-lara atmosfero, sciante, ke estas sur liaj brakoj la ostecaj manoj de enkapuĉiĝintaj uloj kies vizaĝojn li neniam povis vidi, kaj sentante en sia koro intensan fridon de timo, kvazaŭ tie kuŝus peco de glacio. Nun tamen policaj gardistoj tenas liajn brakojn. La muskoloj de iliaj manoj estas, pro multe da praktikado, tro fortaj por liaj ekstreboj kaj la volo nepre ne esti kondukata Tien. Iliaj brile poluritaj botoj kunkraketas sur la gruzo kun liaj kaj emfazas la silenton de la frua, blua, suneca tago.

En la vakuon de lia cerbo, el kiu antaŭ minutoj forflugis preskaŭ ĉiuj ektimigitaj vespertecaj pensoj kiam oni venis lin voki, susuras la konscio pri lia propra memeco, kiel io kurioza kaj nekredenda. Per la lango li forte ŝmiras la salivon inter siajn lipojn kaj penas ordigi iujn bazajn nociojn, kvazaŭ li ankoraŭ estus ho-

mo, kies funkciado estas pensi, sen troe scii kaj priatenti, ke li posedas ankaŭ korpon rompeblan. Li englutas la salivon.

Estis li Karlo Braŭn, kies preskaŭ nekredeble ordinaraj nomo kaj korpo vere ne estis destinitaj por ĉi tia loko aŭ sorto, nek de la gepatroj, kiuj tra jaroj de strebado lin igis konvena por pli-malpli komforta kaj eĉ iomete klera vivo, nek de la socio en la urbego preter tiuj muroj, kie oni ĝuste nun verŝajne komencas labori en fabrikoj kaj kontoroj.

La gardistoj lin haltigas antaŭ la pordego kun kupraj boltoj. Je la alia flanko oni luktas kun ĝi, sakrante pro tio, ke hodiaŭ ĝi ne volas facile tirapertiĝi.

Imagoj fulmas tra lia cerbo kiel fajra kalejdoskopo, rapide, kvazaŭ ili sciis, ke mankos tempo por li. Li ja tute konscias pri tio, ke certe ne estos tempo rerigardi ilin ĉiujn. Efektive, li ne volas rigardi ilin, kiel kiam li penegis dum la antaŭaj noktoj kaj tagoj skui ilin en ian senchavan ordon neatingotan.

Inter la pecoj troviĝus la terure kuntirita vizaĝo de Elza, lia iama edzino, en kies gorĝon li iun vesperon plenlunan enigis siajn ungojn ĵaluzajn kaj ofenditajn, ĝis kiam ŝi ne plu kapablis kontraŭbarakti aŭ sangfluigante grati liajn brakojn kaj falis de la lito, malrigida kadavro kiu antaŭ nuraj sekundoj ankoraŭ estis vibra, sek-seca, adultema ina korpo. „Ĝis kiam la morto nin disigus...“ estas vortoj kiujn li jam tute ne volas memori, ĉar ili tro memori-gas lin. Ĉiukaze ankaŭ li havos baldaŭ vermojn inter siaj ŝimantaj ostoj, kiel ŝi, sed inter liaj troviĝos ankaŭ rompitaĵ vertebro!

Alia peco en la kalejdoskopo estus la vireca silueto de Johano Brent, tiu porkaĉo, tiu malaminda komplezulo pro kiu li mortigis sian amitan knabinjon kaj kies vulturkoraĉon la kugloj de lia revolvero tiel bedaŭrindege maltrafis. Ho, se nur...!

Daŭras nur momentojn antaŭ ol la pordego obtuze flanken ĉarniras. La imagaro subite iĝas karmezina pilko de flama timo kiu eksplodas en liaj okuloj. Li estas vidinta la eŝafodon! Kiam lia ŝtoniĝinta korpo ree funkcietas sufiĉe malstreĉe, li aŭdas bestan voĉon je alta noto raŭke ŝiranta la aeron super la prizono, tiel ke la gajaj preterpasantoj en la strato ekstere ektimigite alrigardas la grizajn murojn de la konstruaĵo kaj kun batantaj koroj rapidas for. Kun iom da objektiva miro li rekonas la voĉon de Karlo Braŭn.

La fortaj gardistoj stoike antaŭentiras lin ĉebrake, trenante liajn ankoraŭ rigidajn piedojn. Tiam, kun glacia fajro sur ĉiu nervo kaj arterio, li komencas marŝi, sub la longan matenan ombbron de la teruraj traboj sub kiu li estas vivinta ĉiujn ĉi semajnojn. Oni lin atendas tie kie la vojo finiĝas, havante novan rutinan taskon plenumi por gajni la ĉiutagan panon.

Alpaŝas la ekzekutisto, maldika, neforta homo kun bonhumora vizaĝo kaj mildaj lipoj. Li rigardas lin, kiel buĉota ŝafo rigardus sian mortigonton se ĝi povus kompreni, kaj notas la griziĝantajn harojn je liaj tempioj. Jen altiras lian rigardon la longaj, feblaj fingroj de la manoj farontaj la laboron. For estas nun la pensoj kaj la cerbumado de multaj tagoj kaj noktoj, la anticipaj teruro kaj sinturmentoj, la deziro pagi por peko kaj la subkonscia nekredemeco pri io, kio ĉiam okazas nur al aliaj sed nepre ne povus trafi onin mem. Sed li ja estas mortonta!

La aero en liaj naztruoj akre frotas kontraŭ la membranojn, rapide kaj malprofunde gratante la bronkojn kaj pulmojn dum ĝi plonĝas enen kaj ree elsaltas. Nun



li jam ne estas iel ajn mensa estaĵo — nur fizika korpo de timigita viando kaj ostoj kiuj estas dolorigeblaj kaj kiujn oni volas atenci sensvate per kruele senperoneca morto.

Dum oni lin supren tiras kaj ŝovas laŭ la lignaj ŝtupoj, kun la gentila ekzekutisto antaŭe, li subite ekmemoras jam delonge forgesitan okazon de lia infanaĝo kiam li, dekjarulo, devis viziti dentiston. Lin akompanis la patrino, kiu lin ĉiam tiel amis kaj dorlotis. Ripete ŝi lin certigis pri tio, ke la doloro ne estos tro granda por lia eltenivo. Ho panjo! panjo! agonias en li la kriado de trans la jaroj.

Sur la eŝafodo troviĝas kabano kun ia pordo. Li rigardas ĝin kun la plenaj lunoj de frenezeca timo en la okuloj. Nepre li ne eniros! Nenia potenco, tera aŭ infera, lin iam ajn enirigos, eĉ ne la forto de la du kunaj gardistoj!

Ruze oni subite malpli streĉe tenas liajn brakojn.

„Atendu momenton”, diras la ekzekutisto kaj malaperas ĉirkaŭ la kabanon.

„Rigardu tien”, gardisto ekkrias kun surprizo kaj urĝe montras al li ion malantaŭ li.

Kiam li spite la teruron ekturnas la kapon, fortegaj brakoj lin tuj ĉirkaŭkaptas. Ledo kaj frideta

metalo ĉirkaŭas lian kolon kaj premas en la nukkaĵon malantaŭ lia kapo. Nigra tuko falas antaŭ liajn okulojn, por ĉiam enfermante lian elrigardon. Li sin sentas falanta en senfundan, tenebran abismon. Eksonas en liaj oreloj la lasta bruo kiun iam ajn la mondo dotus al li, la krako de la propraj ostoj, disŝiriĝantaj kune kun la mjelo, fadeno de la vivo bela, dolĉa...

Li vekigis en sia ŝvito, sentante mildan manon sur sia ŝultro. Ĉirkaŭ li estas la grizaj, lumigantaj muroj de lia ĉelo. Diras la tenera voĉo de la prizona pastro: „Bonvolu leviĝi, mia filo! La tempo estas alveninta...”

## Belarta Konkurso 1957

## Poezio Tradukita

## Tria Premio (egala)

RUBEN DARIO (Nikaragvano; 1867-1916)

### SONATETO

*La princino malĝojas... Kio ŝin malĝojigas?  
Sia buŝo fragruĝa la vespirojn malligas,  
kaj en ĝi jam ne estas plu la rid' kaj kolor'.  
La princin' sidas pala sur la granda ortrono,  
de l' sonora klavaro formutiĝis la sono;  
kaj en vaz', forgesite, elsvenadas la flor'.*

*Babilema mastrino banalaĵojn parolas,  
en helruĝa kostumo burleskul' kapriolas,  
dum okazas de l' pavoĵ la parad' en la ĝarden'.  
La princino ne ridas, la princino nur mutas;  
la flugantan libelon la princin' persekutas  
de esper' en ĉielo ie en Orient'.*

*Ĉu pri l' princ' de Golkondo aŭ Ĉinuĵ' ŝi sopiras,  
aŭ pri kiu la dolĉajn lumokulojn admiras,  
kaleŝegon arĝentan haltiginte ĉe ŝi;  
aŭ de l' perloj Ormuzaj pri l' ĵiera reganto,  
pri la mastro de ĉiu plej helega diamanto,  
de l' insuloj de l' rozoj pri la bela reĝid'?*

*La rozbuŝa princino kompatinda sopiras  
pri rapidaj flugiloj, ŝi forflugi deziras,  
papili' volas esti, volas esti hirund';  
alsaluti l' iridojn per printemp-poezio,  
en la vent' malaperi sur la tondra markrio,  
laŭ lumvoĵ' de radio almarŝadi al sun'.*

*Jam ne gravas la ŝalko, la puncvesta pajaco,  
radŝpiniĵ' el arĝento, la mirinda palaco,  
aŭ la cignoj sur blua lazurlaĝ' en akord'.  
Kaj malĝojas pro l' floro de l' korteg' en ĝardenoĵ  
ĉiuj rozoj de l' Sudo, Orientaj jazmenoj,  
Okcidentaj dalioj kaj nimŝeoj de l' Nord'.*

*Kompatinda princino de la bluaj okuloj!  
Ŝin katenas la oro, ŝin katenas la tuloj,  
en la kaĝo marmora de la reĝa korteg';  
la impona palaco protektata de gardoj,  
de cent negroj kun siaj longaj cent halebardoj,  
leporhund' nedormanta kaj kolosa drakeĵ'.*

*Papilio feliĉa el kokono foriĝas!  
(La princino ne ridas. La princino paliĝas.)  
Ho, revbildo pri rozoj, kaj eburo, kaj or!  
En la landon de princo ŝi alflugi avidas  
(la princino paliĝas; la princino ne ridas),  
pli belegan kaj brilan ol april' kaj aŭror'!*

*— Nur silentu, princino — la ŝeino susuras;  
sur ĉeval' flugilhava al ĉi tie jam kuras,  
kun ĉasbirdo sur mano kaj en ingo la spad',  
kavaliro feliĉa, kiu amas vin blinde,  
kaj el fore alvenas, eĉ la Morton venkinte,  
viajn lipojn ardigi per amŝajra kisad'.*

El la hispana trad.

J. de Oyarzabal

### LECONTE DE LISLE

#### FIAT NOX

*Tutmonda morto ŝajnas la fluso de la mar',  
Sen halto kaj rapido, en paco aŭ sovaĝo,  
Kiu ŝvelas, grumblas, ondas, iras de plaĝ' al plaĝo,  
De frue ĝis vespero sur pintoj de rokar'.*

*Se kurtas la feliĉo de nia mond' sen saĝo,  
Se ĝemotaĝo estas eterno de centjar',  
Dum al ĉi dia abismo ŝaletas piedpar',  
Angoro kaj feliĉo nur estas songmiraĝo.*

*Ho homa koro, ho vi, martiro en ruin',  
De amo devorata kaj de malam' ronĝata,  
Celanta al libero, kisanta al ĉeno drata!*

*Rigardu! ondo grimpas kaj venas gluti vin!  
Via infer' nuliĝos kaj nigra flus' giganta  
verŝos sur vin forgeson el sia ombro sankta.*

El la franca trad.

Geraldo Mattos





## 43-A UNIVERSALA KONGRESO

Mainz — 2-9 aŭgusto 1958 —  
Germanujo

### OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 3

Decembro 1957

#### Studentaj loĝejoj:

Loĝado en studentaj loĝejoj dum la Kongreso (en ĉambroj kun maksimume 3 litoj) kostos 20 germ. markojn por la tuta semajno. Detaloj sekvas en la Dua Bulteno, ricevota de ĉiu Kongresano.

#### Manĝokostoj en Mainz:

Oni povas manĝi en restoracio en Mainz ek de 2 germ. markoj.

#### Nova Fakkunveno:

Anoncis fakkunvenon:  
Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, F-ino Violet C. Nixon, Woodlands Park Road, Bournville, Birmingham 30, Britujo.

#### Somera Universitato:

La Internacia Somera Universitato anoncas jenajn prelegojn:  
Prof. W. E. Collinson: „La etimologio en naciaj kaj internaciaj lingvoj”.  
Prof. Ivo Lapenna: „Universala Dekla-

racio pri la Homaj Rajtoj (1948-1958)”.  
D-ro G. F. Makink: „Kiel la birdoj flugas”.

#### Belarta Konkurso:

La Belarta Konkurso anoncas sian naŭan konkurson pri:

Originala Poezio (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).

Tradukita Poezio (maksimume 108 versoj per 1 ĝis tri poemoj).

Originala Prozo (ĉiu prozaĵo po proks. 12.000 literoj).

Originala Drameto (ludodaŭro maksimume 25 minutoj).

Peranto: s-ro G. C. Jervis, 343b Birchfield Road, Redditch Worcs. Britujo.  
Limdato: 31-an de marto 1958.

#### Akcepto:

La Urbo Mainz akceptos la tutan kongresanaron en la kortego de la Kongresejo.

#### Kongresejo:

La Palaco de la Elektantaj Princoj de Mainz, unu el la plej belaj ekzemploj de la germana renesanco, en situo fronte al la Rejno, estos la Kongresejo de la 43-a Universala Kongreso de Esperanto.

#### Infana Kongreseto:

La 3-a Internacia Infana Kongreseto okazos samtempe kun la Universala Kongreso en la Feria Domo de Gonsenheim, je 15-minuta tramveturado de la centra stacidomo de Mainz. Estas akceptataj nur infanoj, kiuj parolas Esperanton, inter 6 kaj 13 jaroj. Interesiĝantoj bonvolu peti la programon ĉe la kongresa oficejo.

#### Oficiala Antaŭkongreso:

La Loka Kongresa Komitato elektis la 14-an Internacian Junular-Kunvenon de T.E.J.O. en Homburg/Sarlando Oficiala Antaŭkongreso.

#### Statistiko:

(ĝis fino de novembro) Aŭstrujo 6, Belgujo 6, Brazilo 3, Britujo 18, Bulgarujo 3, Danlando 4, Etiopio 1, Finnlando 1, Francujo 74, Germanujo 91, Hispanujo 4, Israelo 1, Italujo 15, Japanujo 1, Jugoslavio 15, Maroko 2, Monako 3, Nederlando 15, Norvegujo 4, Novzelando 1, Pollando 5, Svedujo 26, Svisujo 13, Urugvajo 1, Usono 3. Entute 316 el 25 landoj (Pasintjare 248 el 22 landoj).

Konstanta Kongresa Sekretario  
G. C. FIGHIERA

## Esperantujo en Bildo kaj Sono



La partoprenintoj de la 42a U.K. en Marseille certe ankoraŭ bone memoras la ruĝan aŭtomobilon kun la okulfrapa transparento „ESPERANTO — FILMO — GERMANUJO”. De tiam la samideanoj kaj iliaj helpantoj de EFG ege penadis, por fini la komencitan taskon. Post unua prezentaĵo antaŭ la germanaj esperantistoj fervojistaj la filmo ankoraŭfoje estas plibonigita en kelkaj detaloj, precipe en teksto kaj muziko. Nun ĝi atendas vin!

La unua, originala, longdaŭra ESPERANTO — SON-FILMO por ni, fakte por NI ĈIUJ estas preta, Brile suk-

cesis ĝiaj unuaj prezentaĵoj en la nuna definitiva formo. „VOJAGO AL MARSEILLE” estas la titolo de tiu amatorfilmo. Laborgrupo de germanaj esperantistoj fervojistaj en Braunschweig elpensis, pretigis kaj finacis ĝin, venkinte sennombrajn obstaklojn. Simpla ludo de kelkaj esperantistaj aktoroj laikaj ĉirkaŭas originalajn scenojn, filmitajn dum la vojaĝo al Marseille kaj dum la kongreso mem. Multaj samideanoj revidiĝos kun si mem sur la ekrano, multaj aliaj eksentos emon, kunesti en tia internacia rondo kaj mem veturi al la belega lando Esperantujo.

Esperantistoj! Nun vi havas vian propran sonfilmon. Bone utiligu ĝin! Kontribuu, multnombro mendante ĝin, ke ESPERANTO — FILMO — GERMANUJO almenaŭ parton de la enormaj elspezoj povos reenspezi, por ke ĝi povu daŭrigi sian laboron. Vi, nur vi decidis pri tio, ĉu la moderna propagandilo FILMO konkeros sian lokon en Esperantujo aŭ ne.

La 15 mm larĝa filmo daŭras proksimume unu horon. Ĉi konsistas el nigrablanka sekurfilmio nebruligebla, unuflanke linitriuta, kun magnetsonspuro sur la filmo mem. La luprezo estas: por 1 prezentaĵo 30 GM (100 steloj), por 2 prezentaĵoj 55 GM (183,3 steloj), por 3 prezentaĵoj 75 GM (250 steloj), por 4 prezentaĵoj 90 GM (300 steloj), por 5 prezentaĵoj 100 GM (333,3 steloj).

Eventuale do estas rekomendinde, ke kelkaj kluboj komune prezentu la filmon plurfoje en sia teritorio. EFG petas, plej malfrue mendi la filmon 4—5 semajnojn antaŭ la planataj aranĝoj ĉe jena adreso, kie ankaŭ la lukondiĉoj estas riceveblaj: Rudi Biernath, Ackerstrasse 53, Braunschweig, Germanujo. EFG donis en siaj prezentaĵoj al ĉiu vizitanto multobligitan slipon kun koncizaj nacilingvaj klarigoj pri celo kaj enhavo de la filmo kaj pri la aktoroj. Modelo de tia slipo estos je dispono de la mendontoj, ankaŭ en Esperanto por esti tradukata en la koncernan nacian lingvon. EFG petas, nepre doni al la neesperantistoj tian slipon antaŭ la prezentaĵo.



# La grupoj, kerno de nia movado

Multaj lokaj esperantistaj unuiĝoj tra la mondo kapablis organizi per multjara laboro multnombrajn anaron kun tradicie vigla vivo, unuarangaj programoj, instruaj kaj distraj. Estas normale, ke tiuj unuiĝoj ne nur ĝuas konsiderindan prestiĝon en la urbo mem, sed ke ili fariĝas centroj kaj modeloj de esperantista agado kaj ke en pluraj punktoj ili povas konkurenci kun pli grandaj kaj potencaj organizaĵoj. Inter tiuj grupoj, kiuj ludas aŭ ludis rolon en la publika vivo oni povas citi: Londono, Zagreb, Malmö, Praha, Torino, Brno. La Kopenhaga Esperanto Klubo, ekzemple, havas same multe da membroj, aŭ eĉ pli, ol la mondkonata „Alliance Française”, kiu tamen estas diversmaniere oficiale subtenata.

Sajnas al ni tre interese, kaj samtempe edife kaj instrue por ĉiuj publikigi de tempo al tempo en speciala rubriko la plej gravajn Esperanto-programojn. Ni ankaŭ sugestas, ke la plej signifaj paroladoj kaj prelegoj estu surbendigataj kaj disponigataj al ĉiuj lokaj societoj esperantistaj pere de la juskreita sonbenda servo de UEA.

Kelkaj el la subaj programoj rilatas al pasintaj monatoj, sed ni opinias, ke ne tiom gravas la aktualeco kiom la valoro de la enhavo. Preterpase ni diru, ke kelkaj programoj aperis presitaj, eĉ sur elegantaj kartonetoj.

## Programoj en Londono

Oktobro:

- 4 — Infanoj de la Suno (C. D. A. Capp)
- 11 — Vizito al Calais (J. Gifford Fowler)
- 18 — La instruado de Esperanto (M. C. Butler)
- 25 — Altgrada Kulturo en Balkana vilaĝo (H. G. Toms)

Novembro:

- 1 — Internacia Amikeco (A. A. Ager)
- 8 — Vizito al Dublino — kun kolorigitaj lumbildoj (J. Casey)
- 15 — Kristnaska Foiro
- 22 — Egiptujo — ilustrita (S-ino D. Worcester)
- 29 — Rusujo — hieraŭ kaj hodiaŭ (F. Thurgood)

Decembro:

- 6 — Rembrandt (Leos Horsky)
- 13 — Zamenhof-tago
- 20 — Kluba Regularo

## En Brno

Septembro:

- 3 — Vivanta gazeto
- 10 — Virino en belarto (Jozef Solčány)
- 17 — 90 jaroj de la nacia artisto Petr Bezruč (Marta Lorkova, Věra Korinkova, František Hort, Josef Vondroušek)

Oktobro:

- 1 — E. H. Grieg — kun reproduktita muziko (Jiri Korinek)
- EKSPozICIO „70 JAROJ DE ESPERANTO”
- 8 — En Budapeŝto kaj ĉe la Balaton-lago — kun diapozitivaj (D-ro Inĝ. J. Šikula)
- 15 — Vespero de surprizoj. Gaja, varia programo de l'Brna esperantistaro
- 22 — Kun „Moravan” en Italio (Václav Duron)
- 29 — TEATRA VESPERO (Reĝisoras: Marie Adamcova)

Novembro:

- 5 — Bonhumoraj travivaĵoj en Hispanio. Diapozitivaj (Treviĉ)
- 12 — J. A. Komensky, lia penado pri la paco kaj interkompreniĝo (Oldrich Kaláb)
- 19 — REVUO TEATRA KAJ RECITA (La junularo)
- 26 — „La Ĉeĥa Paganini” Josef Slavik (Anna Svozilová)

Decembro:

- 3 — Vespero de donacoj
- 10 — En alto super 8.000 m. (Otakar Svoboda)

Belarta konkurso 1957 Tria Premio

## Poezio Originala

### Venuso kaj vulkano

Marjorie Boulton

*Sub Etno la forĝejoj ruĝe flamis.  
Venuso kuŝis. La nudeco lumis.  
Vulkano staris apud ŝi. Li lamis.*

*Distanco vibris kvazaŭ ŝnuropono:  
lin mokis lia propra impotenteco.  
Ranco ekĝustis sur la lang' pro honto.*

*Li tuisis, turnis sin kaj marŝis for.  
Ŝi, freŝa kiel la naskinta mar,  
ankoraŭ blankis en invita ĝlor'.*

*Ŝi povis doni la purpuran rozon,  
sintrovon, sinforĝeson kaj ekstazon,  
venkantan cedon, vekon kaj ripozon.*

*Vulkano iris sub la monton, blovis  
forĝejon; staris apud ŝi kaj revis,  
Poste li faris kion li ja povis.*

*Li fosis, trovis novajn mineralojn,  
ordonis rauke, „Svingu la martelojn!”  
„Mi senflorigos multajn molajn valojn!”*

*Skatoloj mortoplenaj staris are:  
eksplode, brule, vente aŭ kancere  
mortigi... li potencos senkompare.*

*L'armisto de la dioj ekridetis:  
malvarmajn, hokajn manojn li kunĝrotis;  
brilaj skatoloj sub la monto pretis.*

*Venuso dormis en beleco flama.  
Sub Etno, ekĝeliĉe memestima,  
staris Vulkano, impotentia, lama.*

- 14 — ARTVESPERO HONORE AL LA NASKIG-TAGO DE D-RO L. L. ZAMENHOF (Programestro: Prof. Vil Scheiber)
- 17 — Radioaktivaj elementoj por bono de la homaro (Arnošt Baláš)

## En Bradford

Septembro:

- 5 — Renkonta Vespero
- 12 — Bonvenigo de novuloj
- 19 — Kvinminuta vespero
- 26 — Movada vespero

Oktobro:

- 3 — Gaja vespero
- 10 — Prelego
- 17 — El Esperantujo
- 24 — Inter-grupa vespero
- 31 — Konu vian mondon — (3) Norvegujo

Novembro:

- 7 — Literatura vespero
- 14 — Diskuto — Kien B.E.A.
- 21 — Prelego
- 28 — Gaja vespero

Decembro:

- 5 — Movada vespero
- 12 — Recenza vespero
- 19 — Kvin-Minuta vespero

Januaro:

- 9 — Prelego
- 16 — Konu vian mondon (4) Meksikio
- 23 — Movada vespero
- 30 — Nia stato — raporto kaj enketo



**Februaro:**

- 6 — Fondfestoj
- 13 — Literatura vespero
- 20 — El Esperantujo
- 27 — Teatra vespero

**Marto:**

- 6 — La kursanoj
- 13 — Diskuto — propagandaj metodoj
- 20 — Movada vespero
- 27 — Konu vian mondon (5) Italujo

**Aprilo:**

- 3 — Prelego
- 17 — Kvin-minuta vespero
- 24 — Jarkunveno

**En Praha****Septembro:**

- 4 — Malfermo de la II-a parto de la Popola Universitato (Josef Vitek)
- 11 — Telegrafaj perloj (Jojko Stanek)
- 18 — Danĝero de atom- kaj hidrogenbomboj — lumbildoj (Vlad. Janouš)
- 25 — Libera tribunano de klubanoj

**Oktobero:**

- 9 — Seksa biologio — kun lumbildoj (Josef Černý)
- 23 — Bapto de caro Vladimir — daŭrigo (D-ro Tomáš Pumpr)
- 30 — Libera tribunano de klubanoj

**Novembro:**

- 13 — Bonhumoraj travivaĵoj en Hispanujo — lumbildoj (Ludevít Izák)
- 27 — Libera tribunano de klubanoj

**Decembro:**

- 4 — Fonetiko de Esperanto (Zdenek Hršel)
- 11 — Tutjara bilanco de la Popola Universitato
- 18 — Solena vespero de la Verda Ĉaro de Julio Baghy

**En Zagreb****Septembro:**

- 13 — Marseila kongreso surbendigita. La tutan laboron de la kongreso, pere de magnetofono prezentos al ni s-ano Jozo Šlat
- 20 — Antaŭkongreso en Parizo. Parolas s-ano Emilija Lapenna
- 27 — Travivaĵoj dum la kongresaj tagoj. Parolas s-anoj: Ana Büchler, Antonija Albert kaj Zdenka Novljan. Internacia semajno en Besançon. Parolas B. Kurka

**Oktobero:**

- 4 — SAT-organizo. Parolas s-ano Josip Vajdlich
- SAT kongreso en Roterdamo. Parolas s-ano Vokoun
- 11 — Somera pedagogia semajno en Kranjska Gora. Parolas s-ano Danko Rehoric
- 18 — Postkongresaj vojaĝoj. Parolas gesamideanoj Lela kaj Ivo Rotkvič
- 25 — Mia laboro en Norvegujo. Parolas s-ano Zeljko Takač.

La Sidkupa Societo Studas Informadon:

### Intervjuo Kun H. F. SCOTT

*Kun la raporto el Frostavallen en la menso, Jack Cox metis demandojn antaŭ S-ron H. F. Scott sur la scenejo dum kunveno en Bromley, Kent, Anglujo. S-ro Scott nun laboras por „Daily Telegraph” kaj pasinte por „The Times” kaj „The Airforce Daily” (por Usonanoj en Eŭropo).*

**COX:** Nu, S-ro Scott, reklamado ĉiam estas aktuala problemo en la Esperanto-movado. Ĝis nun mi ne rimarkis malgrandajn anoncojn en la klasifigitaj partoj de ĵurnaloj. Ĉu vi supozas, ke malgrandaj anoncoj estas taŭgaj por niaj celoj?

**SCOTT:** Ne. Oni tro facile malrimarkas ilin, krom se oni serĉas tiajn anoncojn.

**COX:** Ĉu gravas se tiuj kiujn oni informas ne estas en ŝlosilpozicioj?

**SCOTT:** Ne, ĉar se tiuj en aliaj pozicioj interesiĝas, post nelonga tempo ili povas tiri la intereson de aliaj, kaj fine la ideoj atingas tiujn kiuj estas en ŝlosilaj aŭ preskaŭ-ŝlosilaj pozicioj.

**COX:** Se ni celas grandan monsumon, estos ebleco ke ni sukcesos havigi ĝin, iel, post tre granda laboro. Ekzemple, loterioj nun estas permesataj en ĉi-tiu lando, kaj multe da mono povas rezulti se oni konstruas bonan reputacion por honesta administrado. Supozu ke ni havas la monon, ĉu ni risku ĝin por amasreklamadoj?

**SCOTT:** Jes, se la publiko estos invitata al prelegoj, ilustritaj paroladoj, elmontradoj de la utileco de Esperanto, filmoj, k.c. Estas necese ke oni bone prezentu ĉiun aferon antaŭ la ĉeestantoj en bone parolata nacia lingvo.

**COX:** La raporto el Frostavallen rekomendis „Gazetarajn Konferencojn”. Ĉu vi povas antaŭvidi tion ĉi-tie?

**SCOTT:** Se Esperanto estos vaste uzita — jes. Aŭ eĉ nun rilate al elstaraj aferoj. Estus estinte bone havi tian konferencon en Londono kiam UNESCO voĉdonis favore al nia lingvo.

**COX:** Ĉu estas bone emfazi la kulturajn aspektojn de Esperanto pli ol la meza Esperantisto ŝatus?

**SCOTT:** Mi opinias, ke la meza Esperantisto ne multe pritraktas altan kulturon. Mi evitus tro da emfazo. La ĝenerala publiko kiel tuto estus maltirita, ne tirita, per tro da kulturo.

**COX:** Ĉu vi povas informi nin pri la bezonoj de redaktoroj?

**SCOTT:** Kiam oni sendas artikolon al ĵurnalo, ĝi estu maŝinskribita, aŭ almenaŭ klare manskribita, uzante nur ĉiun duan linion, (ĉar redaktoroj ĉiam devas fari aliigojn); ne sur la dorso de la papero; lasu marĝenspacojn maldekstre kaj dekstre. Studu la stilon de la ĵurnalo kiun vi elektas, kaj verku en taŭga stilo, se eble. Estu certa pri la faktoj.



# Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.  
\*) ricevebla ĉe U.E.A.

**LA FARAONO\*** de Boleslaw Prus.  
Romano en tri volumoj, tole binditaj.  
Formato 21.5 x 15.5 cm. 960 paĝoj. El  
pola lingvo tradukis Kazimierz Bein  
(Kabe). Kun antaŭparolo de Prof. D-ro  
Jan Zygmunt Jakubowski. Eldonejo  
POLONIA, Varsovio 1957. Prezo:  
24 gld; 96 steloj.

La apero en fria eldono (Unua en 1907, dua en 1912) de tiu romano estas grava kaj feliĉa evento por niaj movado kaj literaturo. Se ni konsideras la eksteron de la libro, ni vidas, ke ĝi estas ne nur unu el la plej multpaĝaj verkoj, sed krome ĝi estas zorge kaj lukse eldonita, sur bonkvalita papero kaj sen preseraroj.

La kovrilo per sia sablo-flava koloro kaj tipstilaj desegnoj aludas pri la



Kabe

scenejo de la rakonto, pri sablaĵdezertoj, pri piramidoj kaj mumioj, pri hieroglifoj kaj Ramzesaj dinastioj, pri la sankta rivero Nilo kaj la mistera rideto de la Svinkso kaj pri ankoraŭ nekonataj sekretoj de la pasinto. La kovrilo per si mem tuj kreas la etoson de tiu epoko kaj de tiu lando, kie kaj kiam naskiĝis la homa civilizo. Ĝi transportas nin malproksimen en la foran historian pasinton, en la lulilon de nia gento.

Kaj se ni konsideras, ke tradukoj en naciaj lingvoj de tiu rimarkinda romano ne abundas (ekz. traduko en bulgara



lingvo aperis nur en 1957, t.e. 50 jaroj post la apero de la esp-a traduko), ni povas rajte fieri pro la nova eldono. La tri volumoj kun indo okupos lokon sur la bretoj de ĉiu vera s-ano kaj per ili ni sukcese pledos por nia afero.

La aŭtoro de la romano, B. Prus (vera nomo Aleksander Glowacki 1847—1912) estas unu el la plej konataj kaj ŝatataj verkistoj, kiujn havis la pola popolo. Li apartenas al la plejado de la plej elstaraj verkistoj-realistoj en la tutmonda literaturo. B. Prus estis eminenta observanto, majstra rakontanto kaj objektiva sociologo.

Jen kion oni povas legi pri li, kiel moto al la Antaŭparolo de la libro far la eminenta pola sociologo Ludwik Krzywicki: „Liaj romanoj iam estos kontribuoj al la scienco: same kiel Dickens en Anglujo, Balzac en Francujo, tiel Prus ĉe ni fariĝos historia atestanto, kiu rakontos al la postaj generacioj, kiel homoj pasigis sian ĉiutagan vivon en Pollando, en la dua duono de la XIX jarcento.”

„La Faraono” aperis en 1890. Ĝi estas la sola tiaspeca verko en la verkaro de Prus. La ĉefa temo de la romano estas la batalo inter la juna faraono Ramzes XIII kaj la potenca kasto de la pastroj. Tiu batalo estas tiel majstre kaj dramece prezentita, ke kiu foje eklegas la romanon, ne povas ĝin flankenlasi ĝis la fintralego. Altirita kaj magnetita per la intrigo la leganto ne rimarkeble englutas ĉiujn ceterajn detalojn pri la ĉiutaga vivo de la antikvaj egiptanoj. Kaj en tio konsistas la merito de la aŭtoro, ke li scias doni al ni aŭtentikajn konojn per interesa kaj alloga maniero.

Sed la ĉefa valoro de tiu romano por ni esp-istoj estas ĝia traduko. Kiel menciite la tradukon faris D-ro Kabe. Kaj Kabe nediskuteble estas la plej elstara tradukanto kaj plej eleganta stilisto en

esp-o. Jen kion ni povas tralegi pri lia tradukarto en la Enciklopedio de Esperanto: „... La du ĉefverkoj de Kabe estas: „Vortaro de Esperanto” kaj la traduko de „La Faraono”... La granda merito de Kabe estas lia influo rilate al la evoluo de la Esp-a prozo-stilo. Lia lingvaĵo estas pura, klara, simpla, vere eleganta, libera de ĉiu naciismo: la „spirito de la lingvo” vivas en lia stilo plenspire kaj sendifekte. Liaj frazoj estas perfekte ekvilibritaj, ĉiu vorto sur sia ĝusta loko. Mankas ĉiu nenecesa komplikajo aŭ trologikajo... Li skribas vere

inf. esp-on, lingvon agrable glatan, lude legeblan.”

Kaj jen, kion Kabe mem skribis pri la temo: „... la lingvo profitas pli multe per la tradukado, ol per libera originala verkado. La originala verkisto ĉiam iel povas eltiri sin, li simple ne uzos malfacilajn esprimojn aŭ simple donos aliajn anstataŭ ili.”

Kaj jen pri sia stilo: „Se efektive mi estas ne malbona esp-a stilisto, mi havas nur unu meriton, ke mi atente legis kaj



Prus

studis la verkojn de nia majstro, inokulis al mi la mirindan simplecon kaj naturecon de lia stilo kaj penis ĉiam ĝin imiti. Se mi sukcesis, mi atingis la rezulton nur dank' al la elekto de bona modelo kaj al fidela imitado.” Post la supraj eldiroj, mi povas fari la konkludon. Ĝi estas, ke la recenzita libro posedas ĉiujn kvalitojn de valora verko en ĉiuj rilatoj kaj ne laste ĝi estas valora kiel modela lernolibro (ne teoria, sed praktika) pri la malfacila tradukarto.

Do, al ĉiuj s-anoj, kaj speciale al la dezirantoj perfektigi en tiu ĉi arto kaj montri estonte la rezultojn de siaj klopodoj per traduko de simile valoraj ĉefverkoj el sia nacia literaturo — mi varme konsilas kaj rekomendas, tuj aceti la romanon, pristudi atente la tradukon (se ekzistas traduko en ilia





propra lingvo, komparu ambaŭ tradukojn) kaj imiti la tradukmanieron de Kabe por atingi lian elegantan stilon kaj traduktalenton.

Estas mia agrabla devo nepre gratuli kaj danki al la eldonejo Polonia kaj al la polaj s-anoj pro ilia favora rilato al nia ideo kaj pro la belega eldono.

Certe la eldonejo havos la dankon kaj la subtenon per la aĉeto de la libro de ĉiuj landoj en la mondo, kie loĝas vivaj viglaj esp-istoj. M. P.

**LIGNAJ JUNTOJ ILLUSTRITAJ** de E. M. Rosher. Eldonita de la aŭtoro ĉe „Tamalpais”, Kingsley Green, Haslemere, Surrey, Britujo. 1957. 16 p. 20,5 x 25,5, prezo 6 steloj.

Jen broŝuro kiu formas utilan sekvaĵon por „Carpentiloj” de la sama aŭtoro. Li forte pledas por pli da teknikaj vortaroj kun ilustraĵoj, al kiuj fakuloj povus sin turni por trovi precizajn terminojn kaj priskribojn. La vorto „ŝtudo” por difini la cilindreton de ligno servanta por kunigi du lignopecojn pere de samgrandaj truoj ŝajnas utila neologismo prenata el la angla lingvo (kvankam ĝi tie difinas iom alian metalan aĵon) sed necesus koni la ekvivalenta(j)n vorto(j)n en diversaj aliaj lingvoj por ĝuste taksii la internacian taŭgecon de ĉi tiu. La teksto enhavas iom troan dozon da eraroj kaj malglataĵoj, eĉ de elementa tipo kiuj devas ne troviĝi en tia verko. Ili estus facile eviteblaj se la kompilinto estus doninta sian manuskripton al amiko por tralego. Ekz. la titolo „Lignaj juntoj kaj siaj formoj - ilustritaj” ĝenas la okulon jam en la komenco. La ripetfoja uzo de „ambaŭ... kaj...” anstataŭ „kaj... kaj...” makulas la stilon samkiel la neĝusta uzo de vortoj. Ekz., sur paĝo 6 - „La terminoj... aplikas al ambaŭ simplaj kaj duoblaj ŝraŭboboriloj”, devus teksti: „La terminoj... aplikas al kaj simpla kaj duobla ŝraŭboboriloj.”

Tiaj malperfektaĵoj neniel malpliigas la efektivan valoron de ĉi tiu utila kompilaĵo kies preparo postulis multe da pacienca laboro. Ni des pli gratulas kiam ni ekscias, ke la laboranto estas 81 jarulo. De, kaj el tiaj spiritoj estas la regno de esperantujo konstruata.

T. F.

**TEACH YOURSELF ESPERANTO\*** de John Cresswell kaj John Hartley. Eld. The English Universities Press Ltd., Londono, 1957. 205 p. 18 x 11. Prezo 7 ŝ 6 p (15 steloj).

Perfekta lernolibro supozeble ne ekzistas. La plimultaj lernolibroj por anglalingvanoj, ekzemple, misprezantas la esperantajn participojn kaj, pro la kompleksaj verbformoj de la angla lingvo, donas ekzemplojn kiuj nur konfuzas la lernantojn kaj nenecese malfaciligas al ili la lernadon. Tiurilate, laŭ mia opinio, ankaŭ tiu ĉi nova lernolibro ne estas tute senkulpa; sed, dirinte tion, mi volonte agnoskas plue, ke ĝi estas, denove laŭ mia opinio, la plej bona lernolibro por anglalingvanoj. Ĝi taŭgas, kompreneble, kiel la titolo mem jam anoncas,

preskaŭ nur por memlernado: por klasoj ĝi verŝajne ne tre taŭgas; sed mi estas certa, ke tiu, kiu komencas lerni per ĝi, ankaŭ finlernos. La prezentado estas klara kaj interesa, kaj la speciale preparita materialo de la libro certigas, ke tre rapide la lernanto komencas legi tekstojn, kiuj stimulas lin al tia legado. Nome, post la kvina leciono la legmaterialo konsistas el paĝoj de fantazia ĵurnalo, ekzemple: la Radio-programo, Notoj pri la naturo, Paĝo por virinoj, Reklamoj, k.s. Tio havas ankaŭ la avantaĝon, ke ĝi firme ligas Esperanton al la moderna medio, kaj pravas ĝian taŭgecon por ĉiuj facetoj de la vivo ĉiutaga, kiel ĝi ankaŭ donas al la leganto unuavice tiujn vortojn kaj esprimojn, kiujn li tuj kaj plej urĝe bezonas. Al la efikeco de tiu metodo nepre kontribuas la ilustraĵoj de John Hartley, konata al la esperantistoj pro liaj kovriloj de la Stafetolibroj.

Mi submetis la libron al povo pragmatika: mi donis ĝin al lernantino, kaj rimarkis kun plezuro la entuziasmon de ŝia lernado kaj la rapidan fluigon de ŝia parolado. Ne nur mi, sed ankaŭ ŝi firme rekomendas la libron.

English Universities Press estas gutulinda pro la servo, kiun ĝi faris al nia lingvo, aldonante tiel bonegan volumon al ĝia lingva serio. W. Auld

**DEKKINGA FUGAS\*** de Tjeerd Adema. Trad. el nederlanda F. Faulhaber, L. Ak. 219 p., 21,5 x 13,5 cm. 1957 Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj. Prezo 12 d.kr., 6,50 g., 7,50 g.m., 12 an. ŝil., 1,75 us.dol., 24 steloj.

Preskaŭ ĉiu homo almenaŭ unu fojon en la vivo deziras forigi iun parencon, kiu ŝajnas granda obstaklo al lia aŭ ŝia feliĉo. Preskaŭ ĉiu de tempo al tempo volas, ke li povu forlasi la malfacilaĵojn de sia propra vivo kaj silente malaperi por komenci en iu alia loko pli bonan kaj pli feliĉan novan vivon. Sed preskaŭ ĉiu cedas pri tiu sia deziro, konscia ke ĝia efektiviĝo estas trege malfacila.

Tjeerd Adema per sia romano donas al ni la eblon senpeke vidi tiun nian subkonscian revon efektivigita en la persono de lia heroo Dekkinga. Li renkontas ĉiujn embarasajn situaciojn, kiujn oni povas antaŭsupozi, sed ili degelas antaŭ li kun la magio de sonĝo.

Efektive populara romano havas la magion de sonĝo. Poste oni ne memoras la neprofundan enhavon, kiu dumtempe tenis la tutan atenton. Tamen DEKKINGA FUGAS restos pli longe en la memoro ol la ordinara populara romano. La verkinto havas fortan antipation kontraŭ ordonemaj virinoj kaj kontraŭ vegetaranoj, kaj li ekspluatas profundajn homajn instinktojn, kvankam la karakteroj de la roluloj estas nur skizajoj.

Oni facile kaj plezure legas la tradukon sen neceso multe konsulti vortaron. Glosoj staras pretaj, kiam oni bezonas ilin, sed eble unu aŭ du pliaj notoj estus utilaj. Ne ĉiu leganto scias, ke „hamstrita” tabako estas kontrabandita aŭ ke aperi „antaŭ la kadion” signifas esti procesata.

La tradukinto estas konata laborema ano de la Lingva Akademio, sed eĉ Akademiano povas fari eraron, kaj nur cinika recenzanto rikanas, kiam li vidas la frazon „sur la bufedo staris apud la te-plado teleron”. Tiu efektive estas certe la sola trovebla stila malperfektaĵo. S-ro Faulhaber havas sian propran opinionon pri la uzo de „kia...”, sed nur unu fojon en DEKKINGA FUGAS ĝi ĝenas la leganton („la sinjorino ne memoras plu, kia lardo aspektas”). Post „tro -a” li logike uzas „ol ke”, kie oni kutime uzas „por ke”.

Edward Ockey

**SUR INSULO MALPROKSIMA\*** de Jo van Hemert-Remmers. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, 1957. 79 p. 20,5 x 14,5 cm. Prezo: 5 dan. kr. (10 steloj).

La unua parto de ĉi tiu streĉe interesa kaj bone presita \*) libro priskribas la fondiĝon kaj kreskon de tiu fekunda regiono de Sumatra kiu nomiĝas Deli. Subite tiun paradizon englutis la milito; kaj en la dua parto ni legas pri ties plej malbonfama kromrezulto, — la koncentrejo. Temas pri tiu, kie la aŭtorino pasigis pli ol tri jarojn, suferante preskaŭ neimageblajn tormentojn, antaŭ ĉio la malsaton.

Nur unu bonaĵo venis el tiu infero: tien hazarde venis Esperantisto, kiu (neeviteble!) starigis kurson kaj tiel konatigis la aŭtorinon kun Esperanto. Finlerninte ĝin poste, ŝi kapablis nun doni al ni libron skribitan en modela Esperanto. („Dum kiam” (43/9) povas apogi sin, kiel „ĝis kiam”, sur „post kiam”; kaj por ambaŭ pledas la fakto, ke per la nedistingo inter konjunkcio kaj prepozicio ĉe „dum” kaj „ĝis” Esperanto perdas iom el sia klareco kaj lingva instrukapablo).

Kiam mi legis kiel la Japanoj traktadis tiujn virinojn kaj geknabojn, apud granda kompato por la viktimoj, mi bedaŭris ankaŭ Japanujon, el kies filoj kelkaj tiel makulis ĝian nomon. Sed se dum legado nia sango bolas, ni memoru, ke neniu lando kiel Japanujo tiel abunde punpagis. La okcidenta mondo ja kvitigis sin, kaj eble eĉ pli. Espereble ĉiu lando fine lernis la lecionon, ke la krueleco ne profitas.

D. B. Gregor

\*) Sed la antaŭlasta linio sur p. 63 erare anstataŭis la ĵustan linion, nun perditan. Bagafelaj preseraroj sur pp. 10/11 kaj 37/10.

**NOTES ON ENGLISH GRAMMAR FOR STUDENTS OF ESPERANTO**, de G. D. Lewis, M.A., F.B.E.A. Havbla de la British Esperanto Association. 48 p., 18 x 12 cm. Prezo: 2 ŝ 6 d afr. (5 steloj).

En sia antaŭnelonge eldonita libro, *Instrumetodo por Esperanto*, S-ro Rakusa bone avertas nin paroli, ne pri la facileco de Esperanto, sed nur pri ĝia relativa facileco, t.e. kompare kun aliaj lingvoj. Estas tamen ankaŭ alia rilato, laŭ kiu oni devas mezuri ĝian facilecon, nome la lingvo de la lernanto mem. Evi-



dente Anglo trovas Esperanton pli facila ol la francan lingvon, sed ĉu li trovas ĝin same facila kiel la Franco? Certe estas, ke la angla lingvo havas tiajn ecojn, kiaj prezentas apartajn malfacilaĵojn al la lernanto de Esperanto; kaj nia aŭtoro faris tre utilan servon al ni Angloj, verkante ĉi tiun libreton, por indiki la plej gravajn punktojn en kiuj Esperanto diferencas de la angla lingvo. Ankaŭ alilandanaj studentoj de tiu lingvo, kiuj baraktas kun la diversaj signifoj de „shall” kaj „should” ktp., trovos, ke Esperanto povas peri al ili pli klaran ideon pri la faktoj.

Ĝi estas aparte taŭga por tiuj „progresintoj”, kiuj ankoraŭ ne sufiĉe... progresis. Jam ne komencantoj, ili bezonas libron, kiu portos ilin tuj al tiu supera grado, kie la idiotismoj de la angla lingvo ne plu faligos. Ili demandu sin, ĉu ili kapablas jam nun traduki frazojn kiel „He does not like being told to go” (p. 23), „He was proud of not having been beaten” (p. 23), „he must have gone away” (p. 38), „they would have their own way” (p. 31). (Mankas tamen diskuto pri „ought to have”, ĉar la sola ekzemplo pere de „should” (p. 31) tute ne sufiĉas. Oni volas scii, ĉu skribi „estus devinta” laŭ la franca kaj itala idiotismo, aŭ „devus esti-inta” laŭ la angla, kiel preskribas Cox (237) kaj Butler (1037). Estas okazoj, kiam „devis” povas anstataŭi la strikte ĝustan formon, kiel ĉe la itala lingvo, aŭ „devus”, laŭ la konata regulo permesanta la uzon de simplaj anstataŭ la pezaj kunmetitaj formoj\*). Tre utila estas la listo de prepoziciaj parolturnoj; tre informaj la sekcioj pri la Infinitivo kaj la Verba Substantivo. Kursestroj certe bonvenigos la libron; kaj al kandidatoj por la superaj ekzamenoj de B.E.A. ĝi estas aparte rekomendinda.

D. B. Gregor

\*) Signo de necerteco pri la afero estas, ke ĉe Sankta Mateo 23. 23 kaj 25. 27 la eldono de 1912 donas vi devis kaj tiu de 1926 vi devus. La greka, kiel la latina, ne distingas inter ought to have kaj had to).

A SUPPLEMENT TO THE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY OF MILLIDGE. De Donald R. Broadribb kun helpo de P. E. Nace; kontrolita de C. D. A. Capp. Eld. Broadribb kaj Nace, Novjorko 1957. 14 p. 21.5 x 13.7 cm. Prezo: 1 \$ 6 p (3 steloj).

La celo de vortaro devas esti: informi leganton pri la signifo de la vortoj, kiujn li renkontos dum sia legado; tiucele la vortoj klarigitaj en vortaro devas esti elektitaj laŭ preciza esploro de la ekzistantaj tekstoj, kaj ne laŭ la fantazio de la vortaristo. Prave la kompilintoj de tiu ĉi vortlisto skribas: „Oni atentigas la leganton, ke la listoj en tiu ĉi suplemento estas nur por informo, kaj oni ne supozu ilin rekomendoj. Krom se la uzanto bone konas radikojn kaj ĝian uzadon, li estu singarda pri la uzado de senstelsignaj vortoj troveblaj en la

listoj” \*); kaj prave ili, por kompili la listojn, studis la ĉefajn postmilitajn verkojn.

La lasta revizio de la Millidge-vortaro okazis en 1924. Ĝi evidente bezonas ĝisdatigon; eĉ en 1924 ĝi estis relative konservativa. Tial la nuna suplemento, precipe pro ĝia alta kvalito, estas treege bonvena. Ĝi eble kontribuos por forigi la iluzion, ke iu, kiu uzas vorton jam de longe tradician en nia literaturo, ekzemple, „enkondukas” ĝin. Kelkaj vortoj jam havas dekojn da „enkondukantoj” kaj centojn da uzintoj; pri *dura*, por preni unu ekzemplon, oni sinsekve „kulpigis” Felikson Zamenhof, Grabowski, Kalocsay kaj la Kvaropon, tra 50 jaroj!

Unu grava ero de la suplemento estas tio, ke ĝi donas multajn landnomojn. Jam estas tempo, ke la vortaroj donu ilin; kaj, interese, la plimulto eĉ ne estas oficialaj!

Mi havas kelkajn komentojn. *Defii* signifas ne nur „to defy”, sed ankaŭ, kaj eble precipe, „to challenge”. La suplemento donas la formon *Finlando*: ĉu la uzado vere pravigas tion anstataŭ *Finnlando*? Kompanse oni donas la, laŭ mi, preferindan formon *Suomio*. Oni notas la formon *finto* = „a feint”, sed ne la formon *finti* = „to dodge” („ĝin iel fiutis plenumiĝo...”). La vorto *foła*, kiun oni ĉi tie difinas „mad, crazy, deranged”, certe ne signifas pli ol „foolish, daft”? „To embrace” ŝajnas tro delikata ekvivalento de *stringi* („la boao sufoke stringis sian kaptajon” (P.V.) = embraced?). Nepe erara estas *tenebro*, kiu NE = „mallumo”, sed „mallumajo”, kaj mi ne scias, sekve, ĉu ĝi estas tradukebla en la anglan. Laste, tiu ĉi suplemento ignoras la fakton, ke *Mario* estas vira nomo en multaj lingvoj.

Supozeble la formoj *kirugo*, *kirugio*, *hirugo*, *hirugio* (anst. kirurgo ktp.) estas preseraroj.

Mi persone bedaŭras, ke *-esk-* ne troviĝas inter la aldonitaj sufiksoj.

La suplemento donas 415 vortojn. Ĝi estas tre rekomendinda kaj necesa libreto por ĉiuj angle parolantaj esperantistoj.

W. Auld

\*) Mia traduko el la angla originala. - W. A.

MEMORLIBRO DE LA ESPERANTISTA EŬKARISTIA MONDKUNVENO\*. Kompilita de Sac. D-ro Johano Baptisto Kao, O.F.M. 215 p, kun 15 ilustraĵoj. 19 x 14. Prezo: 75 brazilaj kruzeroj (32 steloj).

Jen libro kiu havas bonan titolon. Ĝi estas iom pli ol kongreslibro, kaj en ĝi oni povas legi pri la Katolika Esperantista Movado ekde fruaj tagoj ĝis la nunaj. En Rio de Janeiro okazis en 1955 la tiujara Internacia EŬkaristia Mondkunveno, kaj al ĝi aliriĝis de ĉiu mondparto eminentuloj ekleziaj kaj fideluloj por honori la Sanktegan Sakramenton. La temo estis la EŬkaristia Vivo, kaj la referatoj, prelegoj, kaj paroladoj reliefiĝis en ĉiuj fazoj tiun temon, rilate al

la Eklezio, la individuo, la homa socio kaj la familio. Tiu parto de la libro okupas, kun la dokumentita antaŭlaboro kaj salut-paroladoj, 11 ĉapitrojn. La ĉapitro 9, „La Katolika Esperanto-Movado en la servo de la EŬkaristia Kristo”, estas historio de la Katolika Esperantista Movado ekde la unuaj tagoj, kiam D-ro Zamenhof prezentis al la mondo la internacian lingvon. Ĝi memorigas, ke Pastro Dombrovski, tiutempe profesoro en seminaro de Peterburgo, skribis postkarton al nia Majstro en la jaro 1887, promesante lerni Esperanton. Sekvas Episkopo Zerr de Saratov, Sac. François Xavier Solis de Kanado, Richard H. Geoghegan, irlandano kiu verkis la unuan anglalingvan Esperantolernolibron en jaro 1889, Louis de Beaufront, kaj aliaj pioniroj de nia movado, ĝis Sankta Pio X, la unua Papo, kiu benis ĝin. Tiuj ĉi notindaj faktoj pri la Katolika Esperantista sekcio de la universala movado ja estas memorajoj al multaj katolikoj kaj ankaŭ, mi kredas, ne-katolikoj. La dua parto de tiu ĉapitro skizas la evoluon kaj internaciigon de nia movado, kaj la tria rilatas al faktoj kaj notindaj literaturaj aferoj, verkoj, kaj sindonaj laborantoj niaj.

Ĉapitro X, Jen Parolado de la Sek, de Brazila Esperanto-Ligo, D-ro Mario Riter Nunes, kies parolado estas la unua en serio kiu rilatas al „Esperanto kaj Katolikismo”. Ĉe la fino de la lasta de Profesoro Carneiro da Silva mi legas jenon „Ĉu vi volas scii KIAM ni komencos nian movadon? (Li ĵus estis parolinta pri neceso fondi Brazilan Katolikan Esperanto-Ligon). Mi respondas! Kial morgaŭ, se ĝi povas komenciĝi hodiaŭ? La forpasinta tempo revenos neniam, la elperditan ĝustatempon vi utiligos neniam.” Jen la spirito kiu montriĝis tra la tuta kunvenado, urĝante la neceson pacigi la mondon pere de la granda Amo unu por la alia, kio troviĝas en la Sanktega Sakramento, la postrestanta Korpo kaj Sango de Li kiu por ni pekuloj, mortis sur la Kruco. Sekvas aldona parto, kiu konsistas ĉefe el la Du-akta dramo „Heroo de EŬkaristio”. Estas la historio de Junulo „Tarciso” Kiun Papo Stefano I-a elektis porti la Sanktan Sakramenton al la enkarcerigitaj kristanoj je la vespero antaŭ ilia buĉado. Estis la jaro 258 A. D. dum la regado de Valeriano, Roma Imperiestro. Survoje stratbubaĉoj Tarcison haltis, persekutis, kaj fine mortigis. Fine la preĝo de Konsekreto de Brazilo al La Sanktega Koro de Jesuo kaj la Kongresa Himno kompletigas la libron.

Estas kelkaj pres-eraroj pli grandparte de la preskoboldo kaj en la fino troviĝas flugfolio kiu donas ilin kun korektaĵoj.

Jen libro liginda de ĉiu samideano kiu havas en sia koro deziron scii kiel fartas niaj Katolikaj samideanoj kaj kion ili faras por la movado universala. Mi konsilas al tiaj, havigi al si tiun-ĉi libron kaj legi. Ĝi estas riĉigo de niaj bretoj kaj beno al niaj koroj.

N. V.





# LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:

**Nicola Minnaja,**  
**Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo**

## NOVA JARO KOMENCIĜAS

Karaj geamikoj, nova jaro komenciĝas, nova jaro, kiu al ni verŝajne alportos pli da laboro ol da sukceso; nova jaro, en kiu nia junulara movado espereble ankoraŭ prifortiĝos, en kiu en pli multaj landoj ekestos landaj sekcioj, en kiu multaj junaj amikoj transprenos gravajn funkciojn en niaj junularaj organizoj por bone prepari sin al la laboro de la plenkreskuloj. Estas malfacilaj taskoj; tamen ni neniam laciĝu; ju pli ĉiu unuopa juna esperantisto streĉas siajn fortojn por disvastigi nian lingvon inter la junularo, des pli da rezultoj ni povas atingi por nia lingvo kaj por la internacia interkompreniĝo.

Granda estas ankoraŭ la lukto: ni ne disponas pri grandaj financaj rimedoj por vere grandskale varbi, sed nia atuto devas esti morala forto, nia konvinko

pri la valoro de nia afero. Tiu konvinko kreskos en tiu grado, en kiu ni klopodos pli bone koni nian lingvon kaj ĝian literaturon. La nova jaro estu por ni mem jaro de studado: en kursoj, per korespondado, per parolo, per ekzameniĝo.

Vizito de kunvenoj kaj precipe partopreno en la 14-a Internacia Junular-Kunveno de TEJO en Homburgo (Sarlando) estas pro tio plej rekomendinda.

Ju pli bone ni konas nian lingvon kaj ĝian praktikan uzadon en la tuta mondo, la bonan funkciadon de la interkompreniĝo en la kongresoj, des pli bone ni kapablas entuziasmigi niajn geamikojn.

Mi per tio ankoraŭfoje invitas vin tutkore al nia 14-a Internacia Junular-Kunveno en mia lando.

Gis revido en Homburgo!

**Günther Becker, prezidanto de TEJO**

**Germana Esperanto-Junularo kaj la urbo Homburgo/Saar invitas vin kore al la**

## 14-a INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO de TEJO

okazonta de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1958 en Homburgo/Saar - Germanujo

### Provizora Programo:

Interamikiĝa vespero, diservoj en Esperanto, solena inaŭguro, kongresa balo, tuttaga aŭtobusekskurso tra Sarlando, laborkunsido de TEJO, kulturaj prelegoj, filmprezentadoj, oratora kaj sportaj konkursoj, folkloraj kaj gajaj vesperoj, solena fermo kaj forveturo de karavano al la 43-a Universala Kongreso de Esperanto en Mainz.

Ĉiuj gepartoprenantoj rajtos senpage eniri la urban subĉielan naĝejon.

### Kotizoj:

La kotizoj, kiuj enhavas la loĝadon en junulargastejo (por junulinoj) aŭ en lernejo (por junuloj), ĉiujn manĝojn kaj ĉiujn aranĝojn, estas por membroj de TEJO ĝis 31-3-1958 malpli ol 20-jaraj 45.— germanaj markoj, ĝis 30-6-1958 50.— gmk; ĝis 3-3-1958 pli ol 20-jaraj 50.— gmk, ĝis 30-6-1958 55.— gmk.

Ne-membroj de TEJO devas pagi 5.— gmk pli.

### Aliĝo kaj pago:

Aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la Internacia Junular-Kunveno de TEJO, Homburgo/Saar, Germanujo (oficiala adreso de la 14-a IJK), aŭ ĉe jenaj oficialaj perantoj:

**Aŭstrujo:** S-ro Heinrich Reiter, Salzburg 1/557.

**Belgujo:** Reĝa Belga Ligo Esperantista, S-ino J. Plyson, 185 Rue Jourdan, Bruxelles.

**Bulgarujo:** Junulara Fako de Bulgara Esperantista Asocio, s-ro Petko Arnau-dov, Nikifor Pogkonstantinov 38, Pazar-ĝik.

**Danlando:** Centra Dana Esperantista Ligo, kongresvojaĝa servo, Prins Jørgensgade 4 A, København N.

**Finnlando:** S-ro Joel Vilkki, Somero.  
**Franco kaj Sarlando** (teritorio de la franca valuto): Sarlanda Esperanto-Asocio, Frankenholtz/Saar (poŝtgir-konto: Saarbrücken n-ro 5358).

**Italujo:** S-ro Carlo Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, Roma.

**Nederlando:** F-ino Helmi Veldhuyzen, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C (poŝtgir-konto: n-ro 570720).

**Norvegujo:** Esperanta Turista Komisiono, Hjelmelandsgt. 77, Stavanger.

**Svislando:** Esperanto Junularo de Svislando, Nordstr. 216, Zürich 37 (poŝtgir-konto: n-ro IV 6291).

Petante aliĝilon bonvolu sendi internacian respondkuponon al la Loka Organiza Komitato aŭ enlandan reafrankon por letero al la enlanda peranto.

La antaŭpagon de 20.— gmk bonvolu ĝiri al la oficialaj kontoj de la 14-a IJK:

**Banko:** Stadtparkasse Neustadt/Weinstrasse n-ro 9750 (Deutsche Esperanto-Jugend),

**Poŝtĝiro:** Karlsruhe n-ro 54577 (Deutsche Esperanto-Jugend), aŭ al la oficialaj perantoj.

**Bonvolu atenti:** Sendu la aliĝilon kaj la antaŭpagon al la sama instanco. Ali-

ĝilo sen antaŭpago ne valoras kaj ne estos traktata. La antaŭpago ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne venas.

Aliĝilo estas trovebla sur la kovrilo de tiu ĉi revuo.

**Kore salutas vin la Loka Organiza Komitato,**

Prezidanto:  
Vicprezidanto:  
Sekretariinoj:

**Günther Becker**  
**Richard Reuchlin**  
**Magdalena Martin**  
**Waltraud Mork**  
**Helmut Walter**  
**Oskar Höh**  
**Rudolf Ott**  
**Karl Stöcklein**

Kasisto:  
Komitatanoj:

## ANKORAŬ PRI LA VI-a JUNULARA FESTIVALO

Mi deziras precizigi kelkajn punktojn pri la raporto aperinta en la novembro numero de LJV pri la 6-a Junulara Festivalo:

1) Neĝuste estas, ke „neniam antaŭe en la oficiala programo de Junulara Mondfestivalo troviĝis Esperantista Kunveno”; la unua oficiala esperantista kunveno okazis dum la 5-a Festivalo (Varsovio 1955);

2) La Moskva kunveno (250 gesamideanoj el 26 landoj) estis progreso kompare kun la Varsovia (120 el 15 landoj), laŭ nombro de partoprenintoj, daŭro (du tagoj anstataŭ unu) kaj ĝenerala atmosfero (pli libera);

3) Estis kvar oficialaj reprezentantoj de TEJO en la Festivalo: Ben van Moorst, Paul Ciliga, Lucien Piétri kaj mi mem. Bedaŭrinde la Festivala Prepar-Komitato tiel malestimis ilin, ke ili ne ĝuis la saman statuton, kiel la delegitoj de aliaj internaciaj organizaĵoj;

4) Ni ne riproĉu al la festivalaj respondeculoj, ke ili ne simpatias kun ni. Ili simple laboras burokrate, kiel ĉiuj funkciuloj de similaj organizaĵoj.

Ni ĉefe ne riproĉu al niaj moskvaj kaj sovetaj samideanoj, ke „ili faris sian laboron tre timeme”. Mi kuraĝas aserti, ke ili certe faris ĉion, kion ili povis. La progreso de nia movado en Sovetio estas rapida, la entuziasmo de la junuloj admirinda, ĉefe kiam oni ĝin komparas kun la apatio de la maljuniĝintaj okci-



*D-ro Imre Ferenczy, Prezidanto de la Junulara Fako de H.E.K., en Moskvo, 1957.*





Prof. Bokarev, de la Lingvo-Scienca Instituto en Moskvo.

dentaj esperantistaj asocioj. Niaj sovetaĵaj samideanoj faras tion, kion la cirkonstancoj permesas. Ni ne malkuraĝigu ilin per supra juĝo.

Pli ĝuste estas, kulpigi la ne-sovetiajn esperantistojn, ke ili ne sufiĉe interesiĝis pri la Festivalo. Kelkaj eĉ havis negativan starpunkton pro argumentoj ne kongruantaj kun la inteligenta neŭtraleco, kiu devus regi en nia Movado. Se ni volas transformi la Junularajn Festivalojn el folkloraj kaj formala interŝtata manifestacio al serioza kaj sincera interhoma renkonto, ni, esperantistoj, ne devas pene akiri la simpatian de la oficialuloj, sed perforte altrudi nian ĉeeston kaj partoprenon.

Mi opinias, ke niaj sovetaĵaj samideanoj kaj la ĉiulandaj samideanoj partoprenintaj en la Festivalo faris grandan servon al la Esperanto-Movado. Al la aliaj mi diras: ni rendevuu ĉe la 7-a Festivalo, kaj preparu ĝin jam de nun.

Michel Duc-Goninaz, Delegito en la 5-a Festivalo, Oficiala reprezentinto de TEJO en la 6-a Festivalo.

## ESPERANTO KAJ CIVILSERVO

Sendube estas ĝojiga por ĉiuj legantoj la sciigo, ke Esperanto progresas en Civilservo. En ĉi tiu rubriko, kiel ankaŭ en aliaj gazetoj, aperis pluraj alvokoj por Civilservo dum la pasinta jaro. La rezulto estis bona: multaj informoj en Esperanto alvenis al la Internacia Sekretariejo, ĉefe el Orienteŭropo, kaj kelkaj esperantistoj laboris en la laborkampoj de Civilservo, inter ili grupo de 10 poŝtoj. La nombro de la leteroj estis tiel granda, ke la Internacia Estraro (ĝis nun ne tre favora al Esperanto) iom post iom interesiĝas pri la Internacia Lingvo. En oktobro ĝi decidis sendi alvokon en Esperanto al ĉiuj personoj, kiuj povus interesiĝi pri la projekto.

Sed la plej grava punkto ne estas la decido kaj la organizado de la laborkampoj; ĝi estas la sukceso. Ĉiu el vi povas helpi al ĝia sukceso, diskonigante ĉi tiun alvokon, kiun ni ĉi sube aperigas. Poŝta adreso: Secrétariat International SCI (Esperanto-fako), 77 Bd. Jean Jaurès, Clichy (Seine; Francujo).

Post intereso de multaj esperantistoj

pri Civilservo, ni intencas starigi laborkampojn, dum venonta somero, kies ĉefa lingvo estus Esperanto. La sukceso de tiu laborkampoj dependas de la ebleco por ĉiuj, akiri la necesajn vizojn. Laŭ niaj opinioj, Pollando estus la plej taŭga loko, kiu permesus al niaj amikoj el orienta kaj okcidenta Eŭropo renkontiĝi. La laborkampoj okazos certe dum aŭgusto.

Tamen, antaŭ ol decidi kun certeco la landon por tiu eksperimenta laborkampoj, ni petas ĉiun, kiu intencas partopreni al niaj laborkampoj, respondi kiel eble plej baldaŭ al la suba demandoj:

- 1) Al kiu lando vi povas plej facile ricevi enirpermeson?
- 2) Ĉu Pollando taŭgas al vi?
- 3) En kiun landon vi preferus iri?
- 4) Dum kiom da tempo vi dezirus resti?
- 5) Dum kiu monato?

Aldonu vian nomon kaj adreson, kaj, se vi deziras la bultenon de Civilservo, menciui, ĉu vi deziras ĝin en angla, franca aŭ germana lingvo, kaj sendu vian respondon al la supre skribita adreso.

## SPECIALE POR STUDENTOJ

„Mondaj Studentaj Novajoj”, ilustrita revuo eldonata en ok lingvoj (angla, araba, franca, germana, hispana, itala, norvega kaj rusa) de Internacia Studenta Unuiĝo, komencis publikigi en sia numero 11/1957 kurson de Esperanto, gvidatan de juna inĝ. Zdenek Capek el Prago.

Nun estus necese, ke la tutmonda esperantista gestudentaro montru viglan intereson por tiu ĉi revuo, kiu jam de pluraj monatoj aperigas anoncojn en „Esperanto”. Pro tio ni konsilas al la esperantistaj studentoj, ke:

1) la loĝantoj de landoj, en kiuj estas parolata unu el la lingvoj en kiuj aperas MSN, gratulu al la redakcio pro la Esperanto-kurso;

2) tiuj, kies lingvo ne troviĝas inter la ok supraj, skribu en Esperanto, konsilante Esperantan eldonon. (Adreso: Vocolova 3, Praha 2, Ĉeĥoslovakujo).

La probable de Esperanto eldono ne estus tro malgranda: en Bulgario, Ĉeĥoslovakujo, Ĉinujo, Hungarujo, Japanujo, Jugoslavio, Vietnamo, estas multaj esperantistaj studentoj, kiuj legas tiun revuon en fremdlingva eldono: se aliĝos al tiu nombro ankoraŭ areto el la ceteraj landoj, tiam la nombro de la esperantistoj tute certe superos tiun de la norvegaj aŭ arabaj legantoj de MSN.

(el letero de Aleksandro Csàder, Ĉeĥoslovakujo)

## MALLONGAJ INFORMOJ

\* La 28-an kaj 29-an de septembro okazis en La Chaux-de-Fonds la septembra semajnfino de Esperanto-Junularo de Svislando, kiu havis sian amuzan kulminon en aŭtomobil-pied-ŝip-trajn-ekskurso ĉe la franca landlimo kaj sian solenan kulminon en la ekŝiĝo de Claude Gacond, la inaŭgurinto de la semajnfinoj kaj fondinto de la informilo „La Juna Voĉo”, el la posteno de prezidanto

de Esperanto-Junularo de Svislando, kaj en la elekto de Max Abegg kiel lia anstataŭanto. La nova komitato de Esperanto-Junularo de Svislando konsistas el: Prezidanto kaj Kasisto: Max Abegg (Zürich); Vicprezidanto: David Bühlmann (Langenthal); Redaktoro: H. J. Fuchslocher (Serrières); Organiza Centro: Cosette Giroud (La Chaux-de-Fonds); Propaganda Centro (franca): Claude Gacond (La Sagne); Propaganda Centro (germana): Hans Grossmann (Selzach).

\* Sveda Esperanto-Federacio iniciatas la fondon de junulara sekcio; estas nomita provizora komitato, konsistanta el: Prezidanto Nils-Erik Kristoferson (Motala); Sekretario: Kjell Rehnström (Uppsala); Kasisto: Lillemor Streng (Skövde).

\* En la lernejoj de Hungarujo fondiĝis kelkaj novaj esperantistaj fakroj. Estas eble, ke en la venonta somero estos aranĝita Somera Esperanto-Tendaro por la junularo. La Junulara Fako ek de novembro pretigas sian laborprogramon por 1958-a.

\* En Budapeŝto aperas en pluraj lingvoj la revuo „Junularo de la mondo”, fratrevuo de „Mondaj Studentaj Novajoj”, pri kiu vidu alian artikolon en ĉi tiu paĝo, sed dediĉita al la ne studenta junularo. Tiu ĉi revuo aperigas en sia hungarlingva eldono Esperanto-paĝon kun novaĵoj kaj kursoj; ĝin redaktas s-ano Ludoviko Márton, ĝenerala sekretario de la hungara Esperanto-movado.

\* Ek de la komenco de la jaro Jugoslavio Esperanto-Federacio eldonas porjunularan monatan gazeton „La Progreso”, sub la redaktado de Ilija Antonijviĉ. La adreso estas: „La Progreso”, Terazije 42, Beograd (Jugoslavio).

\* La tri Esperanto-tendaroj organizitaj dum la lasta somero en Ĉeĥoslovakujo bonege sukcesis: 180 estis la partoprenantoj en Doksy, 100 en Popolna, 20 en Koněštin.

## NIA FORUMO

### Izraelando-Izraelio-Izraelo-Israeĵo

Tro multe da nomoj por tiu ĉi malgranda lando! La montran „Izraelando” oni apenaŭ povos aprobi. Same oni ne uzu „Izraelio”, ĉar ne temas pri „-io” (= lando) de izraeloj. Sufiĉus „Izraelo”, sed ĝenas en ĝi la „z”, kvankam ĝi devenas de Zamenhof. Li imitis la rusan skribmanieron, kiu tamen nenie sin povas apogi, nek sur la originalo hebrea, nek sur iu el la ĉeflingvoj — ĉie aperas „Israel”. En streko de la erara „z” kaj en ĝia anstataŭo per la litero „s” kuŝas sendube la solvo. Estonte ni uzu „Israelo” por nomi tiun staton/kaj „israelano” por ĝia loĝanto!

O. Ginz, Kirjat Jam.

(Sendube s-ano Ginz pravus en tio, ke tiu landnomo havas ĝis nun tro multajn formojn. Tamen ŝajnas al ni necese, ke unuavice la loĝantoj de tiu lando akordiĝu inter si pri la plej taŭga formo; poste ni aliaj volonte akceptos ilian decidon! — Red.)



# Tra la Mondo

• **Progreso en Hungarujo.** En la universitato de Budapeŝto kaj en la ĉeflernejo de Szeged okazas Esperanto-kursoj. En kvar lernejoj de Szeged 200 lernas la lingvon. En Budapeŝto okazas 12 kursoj. En Hungarujo nun estas 73 fakrondoj; 43 en kulturhejmoj kaj 27 junularaj. Ĉe festkunveno la 7an de novembro de la „Paco” Esperanto-Fakrondo de la Va distrikta Kulturhejmo, ĉe kiu parolis kaj deklamis interalie Baghy, Kalocsay kaj Kókény, gastis prof. Simeon Hespáncsev el Sofia (Bulgarujo) parolis pri seriozaj kontaktoj kun la redaktorado de la Granda Soveta Enciklopedio, kaj kun soveta lingvistoj, nun favoraj al Esperanto.

• **Omaĝo al eminenta verkisto.** Malgraŭ malfacilaj cirkonstancoj por tiu celo, eminentaj verkistoj katalunlingvaj kunvenis ĉirkaŭ nacia kaj internacia eminentulo Pujula okaze de lia 80-jara jubileo. S-ano Pujula bonhumore memorigis per belaj frazoj kaj anekdotoj heroajn momentojn de la katalunlingva revigligo kaj konatigo de Esperanto en Barcelono kun la 5a Universala Kongreso sukcese okazinta en 1909. El multaj esperantistaj rondoj en Katalunujo alvenis aliĝoj kaj amikaj salutoj al nia pioniro, malgraŭ ke la kunveno devis esti nur privataĵo de verkistoj.

• **Grava firmao utiligas Esperanton.** La sveda firmao „Aktiebolaget Separator Stockholm” aldonis al instrukcia slipo por sia senkremito „Alfa-Laval”, antaŭe eldonita en 13 lingvoj, ankaŭ tradukon en Esperanto, kiun ili konsekvence metis sur la unuan lokon.

• **Esperanto en popola altlernejo.** La Praktika Lernejo en Karlskoga, kiel la unua popola altlernejo en Svedujo, enprenis Esperanton en sian programon. La kursoj, gvidataj de s-roj R. Lindahl kaj E. Bonander, estas vizitataj de 30 gejunuloj 17-25-jaraj. La lernantaro venas el la tuta Svedujo kaj la lernejo estas unu el la plej konataj. La sveda

gazetaro tre atentis la kurson, kiu dank’ al energia subteno de la rektoro (S-ro H. Jakopsson, Karlskoga Praktiska Läroverk, Karlskoga, Svedujo) bone sukcesas.

• **Radioprogramo en Bulgarujo.** Okaze de la du datrevenoj: 70 jaroj de Esperanto kaj 50 jaroj de Bulgara Esperanto-Asocio, en Pazarĝik estis aranĝita 20-minuta radioprogramo pere de la loka radiocentro. Post prelego de P. Arnaudov estis belarta programo. Multe helpis la respondeculo de la radiocentro, ĵurnalisto K. Genčev, per kies helpo ankaŭ aliloke estis aranĝitaj disaŭdigoj por Esperanto.

• **Esperanto en la novzelandia parlamento.** S-ro Gotz, parlamentano por Manukau, demandis al la novzelandia Edukministro, la 25-an de septembro, ĉu li „volas progresigi la studon de la internacia lingvo Esperanto, kaj konsili ĝian instruigon en postelementaj lernejoj kiel alternativo al fremda lingvo”. La respondo estis malfavora.

• **Nacilingva suplemento al „Jugoslaviana Esperantisto”.** En oktobro aperis nacilingva informa suplemento al „Jugoslaviana Esperantisto”, sub titolo „Međunarodni Jezik”. Sur 8 grandformataj paĝoj estas prezentita bonega superrigardo super la nuntempa movado, kun trafikaj faktoj, tradukoj kaj ilustraĵoj. Certe tio reprezentas bonegan varbmateriaron, kaj ni gratulas al niaj jugoslavianoj samideanoj.

• **Nova turistformilo en la Internacia Lingvo.** Balkanturist (Bulgarujo), kiu jam multfoje uzis Esperanton por informaj kaj turismaj celoj, ĵus eldonis novan 48-paĝan libron pri turismoblecoj en Bulgarujo. Tiun ĉi utilegan informilon oni povas mendi ĉe: Balkanturist, bulv. Al. Stambolijski 14a, Sofia, Bulgarujo.

• **Esperanto en la gazetaro.** La oficiala revuo de la arto kaj intelekta unuiĝo de francaj fervojistoj, „Arts cheminots”, kiu jam multfoje pruvis sian favoron pri nia afero, havis en sia numero 21 gravan artikolon „Kulturaj

interŝanĝoj kaj Esperanto”. En islanda tagjurnalo „Thjóðviljinn” de la 19a de septembro aperis longa artikolo de Kristófer Grimsson, sub titolo „Esperanto kiel kultura ligilo”. Ni jam plurfoje raportis pri la regulaj artikoloj kaj sciigoj pri Esperanto, kiuj aperadas en „Ilustrowany Kurier Polski” (Pollando); tiu serio daŭras. La redakcio petas taŭgajn informojn el la tuta mondo (vidu anoncon en la decembra „Esperanto”), por ke tiu rubriko estu plivastigita. Alia gazeto, kiu regule enhavas esperantistan rubrikon, estas „República” (Portugalujo); la rubrikon verkas nia amiko Saldanha Carreira. Menciinda estas lia artikolo „O que seria...” (la 7an de novembro, 1957, en kiu li satireme priproĉas la portugalajn esperantistojn pro „nepravaj teruroj pro petolaj onidiroj, la neprofitigo de la relativa libero donita la 12an de aprilo 1951 al la esperantista portugala movado...” En „Post Office Magazine”, novembro 1957, aperis raporto pri brita poŝtestro S. Curran, kiu kiel esperantisto povis viziti la ĉefan poŝticejon en Rotterdama kaj vidi ĉiujn fakojn. „Hexham Courant”, ankaŭ brita, raportis sur la unua paĝo pri esperantistaj elsendoj el Bilbao (Hispanujo), kiuj menciis la Abatejon Hexham kaj monokolektadon por ties rekonstruo. „Kisalföld” (Hungarujo) daŭrigas sian Esperanto-angulon, kaj en la novembro numero de la revuo „Világ Ifjusága” aperis en la ĉiunonata Esperanto-rubriko dukolumna detala biografio pri Julio Baghy, kun foto.

• **Librolistoj.** Ĝus aperis la nova 20-paĝa katalogo de la eldonserio „Stafeto”, (J. Régulo Pérez, Kanariaj Insuloj). Per „Babilo pri Stafeto” oni donas superrigardon super la historio de tiu kuraĝa entrepreno, kaj listigas la manuskriptojn eldonotajn en estonteco. Poste oni donas ĉiujn detalojn, kun ĉerpaj aĵoj el recenzoj, pri la jam aperintaj verkoj.

Ankaŭ Dansk Esperanto-Forlag ĵus eldonis 4-paĝan ilustritan katalogon pri siaj eldonaĵoj. (Adreso: Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danujo.)

## LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1957

Stato je la 30-a de novembro 1957

### Konkurso I

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Usono	2016	3173	157,39
2. Danlando	1910	2733	143,08
3. Hispanujo	2092	2508	119,88
4. Francujo	6575	7637	116,15
5. Nederlando	4894	5517	112,72
6. Svislando	1910	2135	111,78
7. Italujo	3620	3980	109,94
8. Jugoslavio	3563	3800	106,65
9. Germanujo	6515	6790	104,22
10. Finnlando	2687	2765	102,90
11. Brazilo	6985	6983	99,97
12. Svedujo	6895	6855	99,42
13. Belgujo	1952	1907	97,69

14. Norvegujo	2113	2019	95,55
15. Britujo	7351	6985	94,65

### Konkurso II

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Aŭstralio	1025	1228	119,80
2. Argentino	745	855	114,76
3. Urugvajo	325	360	110,76
4. Aŭstrujo	1400	1505	107,50
5. Japanujo	1210	1280	103,78
6. Novzelando	942	935	99,26
7. Sudafriko	230	225	97,83
8. Portugalujo	580	560	96,55
9. Kanado	500	440	88,—
10. Izraelo	290	240	82,76
11. Islando	405	295	72,84
12. Maroko	1061	538	50,70



## Belarta Konkurso 1958

Ni invitas la naŭan fojon niajn verkistojn konkuri en la Belarta Konkurso. Internacia komisiono prijuĝos la verkojn. La proklamo de la rezultoj kaj la prezento de la gajnintaj verkoj okazos dum la 43a Universala Kongreso en Mainz. Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj ankaŭ monpremion.

### Literatura Sekcio

1. Originala poezio (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).
2. Tradukita poezio (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).
3. Originala prozo (ĉiu prozaĵo po proks. 12000 literoj).
4. Originala drameto (ludodaŭro maksimume 25 minutoj).

Pri la kongreslanda branĉo oni anoncos poste.

Generalaj reguloj por partopreno.

(Oni rimarku ŝanĝon en la regulo koncerne alsendon de konkursaĵoj. Tio rezultas el la fakto, ke s-ro Lawrence, la kutima peranto, ne povas entrepreni tiun funkcion ĉi-jare pro hejmaj kaŭzoj.)

1. Ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 43a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de UEA (ĉu rekte, ĉu per „adopto“).

2. Oni rajtas partopreni per maxi-

mume tri (antaŭe en presformo ne aperintaj) verkoj en ĉiu branĉo. Ĉe la traduka branĉo oni zorgu eventuale pri la represa rajto. La premiitaj verkoj laŭeble aperos en la organo „Esperanto“ kaj oni ne rajtas antaŭe aperigi ilin en alia gazeto.

3. La konkursaĵoj estu laŭeble maŝin-skribitaj. Oni sendu 4 ekzemplerojn de ĉiu konkursaĵo kaj en la traduka branĉo ankaŭ 4 ekzemplerojn de la originalo. Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon. Oni skribu sian nomon kaj adreson sur aparta slipo, eventuale kun sia kongresnumero aŭ kun membromarko de UEA, fermu tiun slipon en koverto, kaj skribu la pseŭdonimon sur la koverto. La koverton oni malfermos nur post la finjuĝo de la verkoj. Oni sendu ĉion al la sekretario de la Belarta Konkurso, s-ro G. C. Jervis, 343b, Birchfield Road, Redditch, Worcs., Anglujo.

4. La limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 31a de marto 1958.

5. Konkursa kotizo (sendepende, ĉu oni sendas nur unu aŭ plurajn konkursaĵojn por unu aŭ pluraj branĉoj): por britoj, 1 ŝilingo 6 penco. En aliaj landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponojn: 3 respondkuponoj (maldekstre stampitaj) aŭ malpli, laŭ la enlanda permeso. Por

landoj, kie la sendo de respondkuponoj estas malpermesita, la partopreno estas senpaga.

Gerald C. Jervis, Sekretario

## La Lingva Flaoso

### „Universala lingvo por spacvoĵagantoj“

Nederlanda profesoro tute serioze faris universalan lingvon-iaspecan spacesperanton. Lia intenco estas ebligi al Teranoj komprenigi sin ĉe inteligentaj estaĵoj eventuale trovotaj sur aliaj planedoj.

La nova lingvo konsistas el signalaj sonoj. Ties aŭtoro nomiĝas profesoro Hans Freudenthal.

(el „Thjodviljinn“, Islando).

### Ĉu Knutoj?

Kiam la Sovetarmea Futbalteamo vizitis Bolton Wanderers Futbalteamon (Anglujo), la angla klubo ĝentile presigis sur sia programo mesaĝon de amikeco en la rusa lingvo. Bedaŭrinde oni tradukis la anglan vorton „club“ (klubo) per la rusa vorto signifanta „club“ (klabo).

(laŭ B.B.C. Londono)

# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de decembro 1957

N-ro 300

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de novembro kaj ankaŭ por komparo, je la fino de novembro 1956:

	1956	1957
Asociaj membroj	16178	18951
Individuaj membroj		
MJ	952	819
MA	4393	5530
MS	737	678
Pat.	9	5
DM	293	307
HM	54	52
JMJ	—	15
JMA	—	100
	6438	7506
	22616	26457

### DELEGITOJ

**Argentino**  
Buenos Aires FD (grafologio): Vakas.

**Aŭstralio**  
Rockhampton (Queensland) D: S-ro Neil Russell, lernejestro, 136 Talford Street.

**Aŭstrujo**  
Wien VD: S-ro Franz Nawratil, kontoristo, Reuenthalgasse 2.

**Belgujo**  
Jabbeke D: S-ro Camille Tousseijn, endom-arkitekto, Statiestraat 35.

### Brazilo

Pelotas (Rio Grande do Sul) FD (Senaciismo): Vakas.  
FD (skoltismo): S-ro Hernani Aquini Fernandes Chaves, studento de agromio, Dr. Cassiano, 103, Caixa Postal 387.

### Britujo

Andover (Hampshire) FD (farmacio): Vakas.  
Bellingham (Northumberland) D: S-ro Martin Sumner, edukista administranto, Spion Kop, Wark Hexham, Northumberland.

Bristol FD (asekuro): F-ino Elsie L. Parson 17 Cornwallis Crescent, Clifton.  
Exeter (Devon) D: S-ro Kenneth Mc Lennan, teknika desegnisto, 8, College Road.

London FD (kremacio): Vakas.  
Slough (Bucks) D: Vakas.  
FD (mondcivilaneco): Vakas.

### Danlando

Frederikshavn D: S-ro Hans Henrik Frey, vicinspektoro ĉe privata real-lernejo, Ørnevej 27.  
Gentofte (Sjælland) D: Vakas.  
FD (muziko): Vakas.  
Kobenhavn FD (literaturo): S-ino Kirsten Zacho, instruistino, Randbølvej 4.  
Kolding FD (instruado): S-ro Karl Børsting, instruisto, Agtrupvej 141.  
Kristrup (Jutlando) D: Vakas.

### Finnlando

Helsinki (Roihuvuori) VD: S-ro Juhani Vilkki, studento, Keijukaistenpolku 11 A 12.  
Sammatti D: Vakas.  
Vlistaro D: Vakas.  
FD (konstruado): Vakas.

### Franco

Les Andelys (Eure) FD (instruado): S-ino Jeannine Le Goff, instruistino, Avenue de Gaulle.  
Romans (Drôme) FD (turismo kaj kampado): S-ro Maurice Dupuy, teknika profesoro, Quartier de la Gloriette.  
Vierzon (Cher) D: S-ro Jean Requillard, fervojisto, La Croix Moreau.  
FD (fervojo): La D.



**Germanujo**  
**München-Pullach** (Bayern) FD (grafo-  
logio): D-ro Horst Bitterling, grafo-  
logo, Jaiserstrasse 16.

**Greklando**  
**Kallithea** FD (turismo): Vakas.  
**Hispanujo**  
**Barcelona** FD (skribmaŝinoj): Vakas.

**Hungarujo**  
**Győr** D: S-ro Andor Gauder, Rónay  
Jácint-strato 2/b.

**Irlando**  
**Loughrea** (Co. Galway) D: Vakas.

**Italujo**  
**Milano** FD (muziko): Vakas.  
**Verona** D: Vakas.  
FD (katolikismo): Vakas.

**Jugoslavio**  
**Beograd** (Srbija) VD :F-ino Duŝanka  
Kačarevic, instruistino, Dalmatinska  
31/IV.  
FD (instruado): F-ino Nedeljka Subo-  
tic, ekonomiistino, Hadzi Djerina 11/I.  
FD (lingvo-instruado): S-ino Vesna  
Skaljer-Race, instruistino, Studentski  
trg 10/11.

**Celje** (Slovenija) FD (ekonomio):  
Vakas.

**Ljubljana** (Slovenija) FD (ekonomio):  
S-ro Marko Dobčnik, oficisto, poŝt-  
fako 275.

**Niš** (Srbija) D: S-ro Slobodan Jeŝić,  
muellisto, V. Putnika 51.  
FD (jurnalismo): La D.

**Novi Sad** (Vojvodina) FD (literaturo  
hungara en Jugoslavio): D-ro Kolo-  
mano Kovács, pensiulo, Dj. Magara-  
sevića ul 14.

**Pula** (Istra) D: S-ro Ihsan Zulfikar-  
paŝic, bibliotekisto, Poŝt. fako 57.

**Slav. Brod** (Hrvatska) VD: S-ro Zden-  
ka Hag, Gunduliceva ul. 56/I.

**Vrŝac** (Vojvodina) D: S-ro Stevan  
Stojnic, emerito, Dositejeva 9/I.  
FD (filatelo): La D.

**Zagreb** (Hrvatska) FD (preventa medi-  
cino): S-ro Josip Slat, sanitara inspek-  
toro, Kontakova 9/I.

**Kanado**  
**Roxboro** (Quebec) D: S-ro U. Paul  
Ronald, inĝeniero, 45, 10th Ave.  
FD (elektrotekniko): La D.

**Malajo**  
**Singapore** D: Vakas.

**Maroko**  
**Meknes** JD: S-ro Lucien Piétri, help-  
profesoro, 15 Place Collet.

**Rabat** FD (radiotekniko): S-ro Georges  
Maigret, radio ĉefkontrolisto, 25 rue  
du Lieutenant Driss Memfioui.

**Monako**  
**Monte Carlo** D: S-ro Jean Joseph Derks,  
ekskonstruisto, „Santa Monica”, 6 bis  
Bd. d'Italie.  
FD (konstruado): La D.

**Nederlando**  
**Amsterdam** FD (fiziko): S-ro C. A. ten  
Seldam, fizikisto, p.a. Has, Bosboom  
Toussaintstraat 65/II.

**Gorredijk** D: S-ro Wessel Grolleman,  
lernejestro, Stationsweg 64.

**Norvegujo**  
**Molde** D: S-ro Björg Kirkhorn Vada,  
Parkvegen 1, Röysan 12.  
**Haugesund** VD: S-ro Erling Vorland,  
bankkasisto, Asalvikveien.

**Pollando**  
**Gdąnsk** (Orunia) D: S-ro Piotr Dowejko,  
fervojojficisto, ul. Smetna 5 m. 1.

**Rodezio-Norda**  
**Kitwe** D: Vakas.  
**Nkana** VD: Vakas.

**Svedujo**  
**Malmö** FD (maŝin-laborado): S-ro Ove  
Krantz, muntisto, Kilbäcksgatan 1.  
**Vilshult** (Blekinge) D: Vakas.

**Svislando**  
**Basel** D: F-ino Sonja Brun, oficistino,  
Bachlettenstrasse 19.

**Chur/Coire** (Grizono) D: S-ro Edwin  
Thomas, komercisto, Hartbertstr. 20.

**St. Gallen** FD (religio-kristana): S-ino  
Lina Reutemann, dommastrino, Linden-  
strasse 134.

**Turkujo**  
**Isparta** D: S-ro Ahmet Hezarfen, instru-  
isto, Hamidiye Köyü, Keciborlu.

**Usono**  
**Floral Park**, Queens (New York) D:  
S-ro George P. Parker, horloĝisto,  
255-37 73 Avenue.

**Fresno** (California) D: S-ro D. R. Metz-  
ler, instruisto en alternejo, 4247 North  
Thorne Avenue.

**Napa** (California) D: S-ino Martha  
Walker, 2846 Monticello Road.

#### PATRONO 1958

1. Lewin, S-ro Maurice, Dunstable,  
Britujo.

#### NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Gacond, S-ro C., La Sagne, Svislando.  
Olsson, S-ino Karla, Ystad, Svedujo.  
Scolnik, D-ro Jaime, Cordoba, Argentino.  
Fighiera, S-ro G. C., Mainz, Germanujo.

#### MEMBRO SUBTENANTOJ 1958

- 27 Couwenberg, S-ro Fr., Blankenberge,  
Belujo.
- 28 Bluett, S-ro T. L. C., Truro, Britujo.
- 29 Dunbar, S-ro Robert, London, Britujo.
- 30 Francis, S-ro R., Chalk, Britujo.
- 31 Kennedy, S-ro D., Bishop Auckland,  
Britujo.
- 32 Kennedy, S-ino M., Bishop Auckland,  
Britujo.
- 33 Lapenna, Prof. D-ro Ivo, Wembley,  
Britujo.
- 34 Lyes, S-ro N. H. A., Gloucester,  
Britujo.
- 35 Pilling, F-ino F., Burnley, Britujo.
- 36 Pilling, S-ro Harold, Burnley, Britujo.
- 37 Murray, S-ro R., Thorpe Bay,  
Britujo.
- 38 Henning Olsen, S-ro E., Glostrup,  
Danlando.
- 39 Zacho, S-ino, Birthe, Brønshøj, Dan-  
lando.
- 40 Bastien, S-ro Glo., Paris, Francujo.
- 41 Guillaume, S-ro J., Le Vesinet,  
Francujo.

42 Bettges, S-ro Johann, Duisburg-  
Meiderich, Germanujo.

43 Bily, S-ro Harry, Berlin, Germanujo.

44 Helfers, S-ro F., Karlsruhe, Ger-  
manujo.

45 Raab, S-ro Johann M., Nürnberg,  
Germanujo.

46 Schönrich, S-ro K., Wiesbaden, Ger-  
manujo.

47 Stoffers, S-ro Robert, Bremerhaven,  
Germanujo.

48 Blöndal, S-ro P. Bjorn, Hvammstan-  
ga, Islando.

49 Catarzi, S-ro Gino, Verona, Italujo.

50 Janjic, D-ro Fran, Zagreb, Jugoslavio

51 Salberg, S-ro Erik E., Selce, Jugo-  
slavio.

52 Baaten, S-ro W., Utrecht, Neder-  
lando.

53 Blokpoel, S-ro H. J., Rotterdam,  
Nederlando.

54 Luyke, S-ro H. C., Katwijk aan Zee,  
Nederlando.

55 Mabesoone, S-ro P. M., Amsterdam,  
Nederlando.

56 Casperly, S-ro H., Oslo, Norvegujo.

57 Rosbach, S-ro Hans A., Hasvik,  
Norvegujo.

58 Skyberg, S-ro Alfred, Oslo, Norve-  
gujo.

59 Støp-Bowitz, S-ro C., Oslo, Nor-  
vegujo.

60 Neumeister, S-ro Frederiko, Arvids-  
jaur, Svedujo.

61 Baur, D-ro A., Liebefeld-Bern, Svis-  
lando.

62 Giannini, S-ro Walter, Zollikerberg,  
Svislando.

63 Hohl, S-ro Jakob, Flims - Dorf,  
Svislando.

65 Perrenoud, D-ro William, Neuchâtel,  
Svislando.

66 Sandmeier, S-ro H., Zürich, Svis-  
lando.

#### NOVA KOMITATANO:

Linton, S-ro K. G., 11 Poplar Street,  
South Caulfield, S.E. 8, Melbourne Vic.  
Aŭstralio.

#### HEREDAĴO

En la nomo de S-ro Wilhelm  
Wellmann, iama fervora membro de  
U.E.A. en Germanujo, mortinta antaŭ  
pluraj jaroj, lia vidvino afable donacis  
al U.E.A. la sumon de 200 G.M., per  
kio ŝi scias agi laŭ la spirito de la edzo.  
La nomo de S-ro Wellmann estos en-  
skribita en la Ora Libro de U.E.A. Li  
ĉiam restos en nia memoro. La Asocio  
sincere dankas la vidvinon de tiu sindona  
membro pro ŝia delikata gesto.

#### DONACOJ AL LA GENERALA KASO

A. K. Beck 2.66 gld.; P. Bouvier 17.38  
gld.; Intersteno 3.— gld.; P. Oosthoek  
1.25 gld.; A. Schweizer 65.— gld.

#### OFICEJA ILARO DE U.E.A.

Kvara informo pri kontribuantoj:  
Prof. M. Fernandez Menendez, J. de  
Oyarzabal, R. Zeballos Morales.  
Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. VERMAAS  
Direktorino C.O.



Prof. D-ro G. Canuto, Italujo, 106,50 gld.; Prof. D-ro I. Lapenna, Britujo, 53,25 gld.; H. W. Holmes O.B.E., Britujo, 53,25 gld.; Ing. G. Azzi, Italujo, 159,75 gld.; D-ro W. Herrmann, Germanujo, 30,— gld.; R. Liech-Walter, Francujo, 50,— gld.; G. C. Fighiera, Germanujo, 30,— gld.; M. H. Vermaas, Nederlando, 30,— gld. Entute: 512,75 gld.

## LASTMOMENTO INFORMO — DOKUMENTO CED/5 EN PLIAJ DU LINGVOJ

Laŭ la jus ricevita informo la dokumento de CED CED/5 sub la titolo Sepdek jaroj de la Internacia Lingvo aperis ankaŭ en la pola lingvo en 10000 ekzempleroj kaj en la nederlanda lingvo en 4.000 ekzempleroj. Tiamaniere tiu dokumento ĝis nun aperis en Esperanto kaj en ses naciaj lingvoj.

## ANONCETOJ

**Koresponda Serva Mondskala.** Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Jugoslavio, Bulgario. Skribu indikante viajn sekson, aĝon, profesion al: Daniel Luez, Laon (Aisne), Francujo, kaj enmetu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

**Mikrokanela disko** por perfekta esperanta prononcado, nerompebla po 335 frankoj. speciala albumo por esperantaj poŝtmarkoj po 900 frankoj. Ribot Esperanto, Marmande, Francujo.

**Por restarigo** de esperantista lernejo ni bezonas a) infanojn, b) domon, c) monon. Ni malsukcesis nur pro manko de infanoj, kiujn ni nun serĉas unuavice. Grupoj kaj fakasocioj diskutu kaj skribu al S-ro Smith, Hilltop Farm, Brighton Road, Crawley, Sussex, Britujo.

**Sendu poŝtmarkojn** de via lando, ni reŝanĝos kun egalkvanto de italaj. Alberto Pirola Grassi, Via Quattro, Stagioni 10, Verona, Italujo.

**Deziras korespondi:** ĉiuj landoj, ĉiaj temoj, interŝanĝi revuojn librojn, pm. Lalju Cankov Raev, bankoficisto, strato „V. Levski” 251, Trojan, Bulgario.

**Deziras korespondi** pri instruistaj aferoj kaj fotografado. Kolektas fotografajojn. S-ro Helgi Jónasson, Ásbúdartröd 9, Hafnarfjörður, Islando.

**Aleksej Tolokoncev,** Kostroma, Prosvetĉenija 1-94, Sovetio, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per leteroj kaj poŝtkartoj. Respondo garantiata.

**Maljuneta Germanino** vizitos parencojn en Florida en marto 1958. Dumvoje ŝi ĝojus kontakti kun samideanoj aŭ kiel paganta gasto aŭ je reciprokaj kondiĉoj antaŭ aŭ post la U.K. en Mainz. Bonvolu skribi al S-ino Schmiedeberg, Renthof 9, Marburg (Lahn).

„**La Vivo kaj Koncepto** de la Societo de Amikoj”. Sendu kvar respondkuponojn al la Sek. K.E.S., Jessie Saunders, Sydney Lodge, Bath Road, Ventnor, I.W., Anglujo.

**Germana Sinjorino** deziras korespondadi kun ĉiuj landoj; ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn. F-ino Else Mattern, Stahlwerk Str. 37, Dortmund.

**Mi tre deziras korespondi** tutmonde pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi bildkartojn. Edvard Piskorski, Piekary Slaskie, la lernejo, 4. ul. Buczka, Pollando.

**Korespondemuloj.** Esperantista Korespondservo refunkcias. Petu senpagan enregistron al Melo 6 pl. J. Ferry, St. Etienne, Francujo. Esperantistaj gazetoj, bonvolu repressi. Antaŭdankojn.

**La plej granda vesperjurnalo** de Svedujo „Aftonbladet” publikigas senpage korespondpetojn de eksterlandanoj. Indiku aĝon, sekson, deziratan korespondtemon. Adreso: Ett ögonblick redaktörn, Aftonbladet, Vattugatan 12, Stockholm 1, Svedujo.

**Kursanoj komencantaj:** inĝenieroj, profesoroj, teknikaj universitatanoj, fervojaj kaj uzinaj oficistoj kaj laboristoj deziras korespondi kun samfakaj plenkoleguloj. Kursgvidanto: L. Király, delegito, Szigligeti Ede-tér 2., Miskolc, Hungarujo.

**Knabajn pentraĵojn** de ĉirkaŭ 6-13 jaroj, deziras interŝanĝi kun tutmondo. Mi petas skribi al Tadaĵosi Taniguchi, Osibeĉo, Siĝa, Japanujo.

**S-ro Jean Requillard,** La Croix-Moreau, Vierzon (Cher), Francujo, deziras korespondi kun la tuta mondo per il.p.k. bele afrankitaj kaj ricevi pk. kontraŭ pm. aŭ sportaj revuoj. Nepre respondos.

**Deziras korespondi** kun ĉiuj landoj pri turismo, alpinismo kaj elektroradiotekniko per letere aŭ per interŝanĝi literaturon kaj bildkartojn. El nia urbeto-situanta en la fame konata Roza Valo, estas multaj dezirantoj korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Certe respondos. Adreso: Bulgario, Levskigrad; ul. D. Georgiev 8, Hristo P. Paskuiev.

**Oficisto, 24 jaraĝa,** fraŭlo, deziras korespondi pri ĉio kaj interŝanĝi p.k. Mihail Nikolov, Ječka Karanfilova 3, Varna, Bulgario.

**Rosa Ma Torra,** C/. Felix Amat, 7 - SABADELL (Barcelona), Hispanujo, dekdulara knabineto deziras korespondi tutmonde letere kaj poŝtkarte.

**Intersteno** de nun fariĝas trimonata. Abono kvar rpk. aŭ korespondaj poŝtmarkoj (por afranko de kvar leteroj al eksterlando) aŭ koresponda kreditigo ĉe U.E.A., S.A.T., Heroldo. C. Daglio, Litta Parodi, Alessandria, Italujo.

**Pri Poŝtmarkkolekto.** Mi deziras korespondi kun samidean(-in)oj el la tuta mondo por interŝanĝi poŝtmarkojn. Respondo garantiata. S-ro Robert Mazade, av. Général de Gaulle, Bourg de Peage (Drôme), Francujo.

**Orfinoj 15-18 jaraj** deziras korespondi kun la tuta mondo. Bonvolu skribi al ilia instruisto: Johano Valastyán, Békéscsaba V, Szepesi u. 5, Hungarujo.

**La Esperanto-Societo** de San Diego aranĝos letervesperon je la fino de januaro. Ni respondos per belaj bildkartoj. P.O.Box 6215, San Diego 6, Kalifornio, Usono.

**Mi vokas la gesamideanojn** en la tuta mondo, sendu al mi por mia varbkolekto 1-jofe la Esperanto-gazeton aŭ revuon el via lando. Mi respondos por ĉio 1-foje per bildkarto kun belaj glumarkoj. Adalbert Masuhr, Sonntagstr. 4, (21b) Hagen-Ekesy, Germanujo.

**Instruistino, 22-jaraĝa,** deziras korespondi kun tuta mondo, esperante aŭ angle. Marilena Yole Faina, Praca da Republica 107-12, Sao Paulo, Brazilo.

**Ĉu vi serĉas esperantan libron** elĉerpitan, eble mi havas aŭ havos. Petu mian libroliston. H. Veenstra, JM. Kemperstraat 28, Amsterdam, Nederlando.

**Hispana fraŭlo** deziras interŝanĝi poŝtkartojn, sed nur panoramajn aŭ kun ĝenerala vidado de tutmondaj urboj kaj vilaĝoj. Manuel Alsino, Str. Joyas 16, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

**Hispana junulo** deziras korespondi tutmonde. S-ro José Parareda, Str. Casanovas 23, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

**Deziras korespondi** pri instruistaj aferoj kaj fotografado. Kolektas fotografajojn. (S-ro) Helgi Jónasson, Ásbúdartröd 9, Hafnarfjörður, Islando.

**Fotoj el la Festivalo** en Moskvo, 44 esperantistaj fotoj (9 x 12 cm) de ekskursoj, renkonto (Grigorjev k. multaj delegitoj) k.t.p. mendeblaj NUN. Po 20 cendoj kanadaj. Ankaŭ 14 fotoj en koloro (de Bokarev, ekskursoj, renkonto k.t.p. Po (diapozitivo) 50 cendoj (sur papero 9 x 12 cm) 75 cendoj. Nur mon-biletoj akceptotaj, sed el ĉiu lando, laŭ la ŝanĝo en la libera merkato. La prezoj enkalkulas aerpoŝtan sendadon. L. Heilberg, 2238 Souvenir St., Montreal, Kanado. (Je nura demando kunsendu int. rpk.).

**David Jenkins,** Apartment 62, 76 Eglinton Avenue, East, Toronto, Kanado, kontisto, volas korespondi. Lingvoj naciaj kaj artefaritaj, religioj, mondaferoj, poŝtmarkoj.

**Okaze de la IV-a Marborda Junularkunveno,** kiu okazos la 9-II-1958 en Gdansk, Organiza Komitato aranĝas letervesperon. Skribu amase. Ĉiu ricevos respondon aŭ laŭdeziro ni peros korespondanton. Nia adreso: Asocio de Esperantistoj, Gdansk, Garncarska 18, Pollando.



## la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de **Prof. G. Waringhien** kun  
kunlaborado de la plej famaj verkistoj aperas ĉiun  
duan monaton 32/40 paĝa - - poŝformato  
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

*Ricevas la abonojn:*

*En Francujo:* R Fiquet, Poŝta konto 2259-98 Marseille

*Alilande:*

Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio:  
7, Av. Léon-Gourdault  
Cholsy-le Roi (Seine)

Administracio:  
5. Bd. Stalingrad  
Nice (A-M)

Francujo

## BELARTO

speciala aldono al la revuo ESPERANTO

aperos en la fino de marto 1958 kun multaj kontribuajoj  
de verkistoj konataj kaj konotaj!

**LITERATURO**

**PENTRARTO**

**MUZIKO**

**LINGVISTIKO**

72 p.

Prezo: 2,75 gld (11 steloj) por membroj  
3,25 gld (13 steloj) por nemembroj

Antaŭmendu jam nun ĉe U.E.A.!

Aperinta!

## ANGLA ANTOLOGIO

1000 - 1800

Redaktoroj:

**AULD kaj ROSSETTI**

kun multaj kunlaborintoj  
320 p., bindita

Prezo: 10 ned. gld. (40 steloj)

**Mendu tuj de U.E.A.!**

## Binditaj Jarkolektoj Esperanto 1957

Ni disponas pri tre limigita kvanto de  
**kompletaj binditaj jarkolektoj 1957**

★

Prezo: por membroj 4,- gld  
por nemembroj 8,- gld

Mendu tuj ĉe U.E.A.!

### ALIGILO

**Bonvolu nepre skribi preslitere**

Mi aliĝas al la 14-a Internacia Junular-Kunveno de TEJO en Homburg/Saar, Germanujo, kaj sendas aliĝilon kaj la antaŭpagon al:

Famila nomo (en nacia lingvo) S-ro, S-ino, F-ino (forstreku du): .....

Antaŭnomo/Voknomo (en nacia lingvo): .....

Strato kaj numero (en nacia lingvo): .....

Urbo (en nacia lingvo): .....

Provinco (kie necesas por la poŝto): .....

Lando (en Esperanto): .....

Naskiĝdato: .....

Profesio (en Esperanto — nur por statistiko): .....

Mi vojaĝos/Mi ne vojaĝos (forstreku unu) per la fervoja karavano de Homburg/Saar al Mainz la 2an de aŭgusto.

Dato de tiu ĉi aliĝilo: .....

Subskribo: .....

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam